

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet ♦ huhtikuu ♦ aprilo ♦ 2/2001



Tradukado de komiksoj en Vintraj Tagoj. Fotitaj Anna Ritamäki, Riitta Hämäläinen kaj Timo Pirinen. Foto: Raita Pyhälä.

Ĉu ekzistas esperanta folkloro? p. 12

Vintraj Tagoj en Hämeenlinna, p. 4

Valamon kurssit, s. 18 ♦ Aŭtunaj Tagoj, p. 21 ♦ Nova rubriko: Impresoj, p. 8

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen aikakauslehti. Suomen esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk tidskrift. Organ för Finlands Esperantoförbund.

Lingvopolitika periodaĵo. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.

Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

Toimitus/Redaktion/Redaktejo: *Aimo Rantanen*

PL 2, 40801 Vaajakoski. ☎ (014) 261 438 ✉ esperantolehti@esperanto.fi

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*

Tollinpolku 1 B 21, 00410 Helsinki. ☎ (09) 530 1804 ✉ ilkka.santtila@esperanto.fi

Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo: 80 mk/vuosi/år/jaro;

Jäsenille/ För medlemmar/ Por membroj: 60 mk; Baltio 60 mk, aliaj landoj 80 mk.

Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:

Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ (09) 715 538

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

Postisiirtotili/Postgirokonto/Poŝtĝirkonto: 800017-230825.

Julkaisija/utgivare/eldonanto: Suomen Esperantoliitto – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Painosmäärä/Eldonkvanto: 400

Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

Prezidanto/Puheenjohtaja: *Jukka Laaksonen*

Uudenkylänkuja 2 B 11, 33530 Tampere. ☎ (03) 255 4724; (050) 5829 248; työ/laboro: (03) 249 3313

Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja: *Anna Ritamäki*

Dragsfjärdsvägen 690, 25700 Kimito. ☎ (02) 423 146 ☎ (02) 423 246 ✉ anna.ritamaki@kolumbus.fi

Sekretario/Sihteri: *Tiina Oittinen*

Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 ✉ tiina.oittinen@pp.inet.fi

Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet:

Anna-Liisa Heikkinen, Asiakkaankatu 2 G, 00930 Helsinki. ☎ (09) 343 1449

Esa Lång, Lokinkatu 5, 15610 Lahti. ☎ (03) 735 2723

Päivi Saarinen, Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

Ritva Sabelli, Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☎ (09) 635 902 ✉ ritva.sabelli@sfs.fi

Vicestraranoj/Varajäsenet:

Eila Martin, Intiönpolku 4 as. 36, 90100 Oulu. ☎ (08) 374 697

Raita Pyhälä, Jykyrintie 3, 69440 Lestijärvi. ☎ (06) 863 7351 ✉ raitapy@jymy.kase.fi

Jukka Vaijärvi, Neulapadontie 3 C 21, 00920 Helsinki. ☎ (09) 349 7334 ✉ jukka.vaijarvi@dinosoft.fi

Rahastonhoitaja/Kasisto: *Antti Mikkola*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ antti.mikkola@orion.fi

Postisiirtotili/Poŝtĝirkonto: 800017-230825.

Toimisto/Officejo: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17-19.

☎ (09) 715 538 (puh.vastaaaja/automata respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

UEA:n pääedustaja / Ĉefdelegito de UEA: *Heta Kesälä*

Kalamiehenkuja 3 D 32, 04300 Tuusula. ☎ (09) 275 5528

Postisiirtotili/Poŝtĝirkonto: 800029-19438647 (maksut UEA:lle/ pagoj por UEA).

Internet: <http://www.esperanto.fi>

Reviviga fazo en nia movado

Esperanto ne estas moribunda. Ne eĉ stagna. Ĉi estas en la fazo de revivigo. Dependas de ni esperantistoj, kion ni faras kun nia lingva ilo. Estas antaŭvidebla ke 90 %-oj de lingvoj en nia mondo mortos dum sekvaj 100 jaroj laŭ plej pesimismaj prognozaj. Ili estas parolataj de lingvogrupoj konsistantaj el 10 ĝis 100 personoj. Tiaj lingvoj ekzistas en tropiko, areo de plej granda bio- kaj lingvo-diverseco.

Proksime al Finnlando ekzistas tia eta lingvogrupo nur en Latvio. Tiu grupo estas la livoj. La livan parolas nur deko da familioj malgraŭ la latvia ŝtato klopodas influi al ties pluvivo. Esperanto kun ebla 100 000a nombro de parolantoj ĝis miliona ne estas minacata. Lingvoj parolataj de ĉ. 10000 personoj kiel ekzemple la vepsa en Rusa Karelio, havos pli bonajn vivkondiĉojn ol la plej malgrandaj lingvogrupoj depende de bonvoleco de registaroj. En Finnlando tiaj lingvoj estas la samea kaj la romia.

Antaŭe la instruistoj eĉ malpermesis paroli la samean hejme, por ke la lernantoj lernu pli rapide la modernan kaj utilan finnan. La lingvosituacio de sameoj

ne estas ankaŭ hodiaŭ tre bona, ĉar administrataj fakuloj ne devige estas obligitaj lerni la samean. La sameoj do ne ĉiam trovas servojn en sia gepatra lingvo.

La romian lingvon oni instruas al finnaj romioj, sed sociajn servojn ili apenaŭ ricevas en ilia gepatra. Finnlando traktas sin kiel dulingva, finna kaj finland-sveda. Sed malpli fortaj minoritatoj ne povis ĝis nun esti egalaj laŭ gepatra lingvo. Mi esperas ke la situacio pliboniĝos, ĉar malbona konduto al minoritatoj ne estas bona demokratio.

Per la statistikoj oni ne povas konstrui bonan Stradivar-violonon. Lingvaj statistikoj ofte ne konvenas al Esperanto, nenies lingvo, hobilingvo, akirita lingvo. La sciencistoj ne prognozas, ke artoj perdos sian publikon, kvankam artkonsumantoj plejparte estas la sama kun esperantkonsumantoj, nome mez- kaj pliaĝaj virinoj kun alta edukiteco. Dependas je nia vidpunkto pri nia futuro, kion ni volas fari per nia akirita lingvo. Revivigu ties uzon per metodoj de nova jarmilo, ofte pli malmultekostaj ol antaŭe.

esperantanen

Vintraj Tagoj 2001

La Vintraj Tagoj 2001 okazis en la sud-finnlanda urbeto Hämeenlinna la 17-18ajn de marto. La loka Esperanto-grupeto (Eila Dahlman, Kati Lindell, Marjatta Niemi, Rai-li Pirttiniemi, Sirkka Varis, Seija Yrjölä) preparis por ni viglan semajnfino en la hotelo Emilia kaj la apudaj kunsidoj de Osuuspankki. La loka gazeto Hämeen Sanomat atentigis pri la evento per antaŭsciigo titolita *Esperanto elää* kaj per 5-kolumna artikolo (18.3) sub la rubriko *Tänään Hämeenlinnassa voi kuulla esperantoa*, kie aperis ankaŭ intervjuoj kun Marjatta Niemi kaj Jukka Laaksonen. Ĉio tio helpis du "samideanojn" (re)trovi Esperanton kaj la Hämeenlinna-grupon.

Sabato

Esperanto estis finnlingve prezentata al aro de scivolemuloj fare de Anna Ritamäki. Ĉeestis sesdeko da aŭskultantoj. Poste prof. Jouko Lindstedt kaj s-ro Jorge Camacho el la Akademio de Esperanto rakontis pri la Akademio kaj ties laboro. Ĝi i.a. konservas kaj protektas la lingvon Esperanto kiel fajrobrigado, respondas al klare formulitaj lingvaj demandoj kaj oficialigas radikojn sed ne kreas novajn.

Se sentiĝas bezono je nova vorto por paroli pri iu nova aĵo aŭ fenomeno, la vortoj naskiĝas kaj disvastiĝas inter la parolantaro, tute same kiel en ajna nacia aŭ etna lingvo. Nur post longa uzado la Akademio povas



Partoprenantoj de Vintraj Tagoj, antaŭe dekstre Börje Eriksson. Foto: Raita Pyhälä.

oficialigi la radikon. Eĉ ne ĉiuj radikoj uzitaj de Zamenhof estas oficialigitaj! Pro la ŝanĝoj en niaj kulturo kaj vivmaniero kelkaj vortoj maloftiĝas, ekz “ŝindo” (päre), dum aliaj iĝas pli kaj pli bezonataj. Nur post longa tempo klariĝos, kiuj vortoj kaj terminoj pluvivos, kaj – se en Esperantujo estiĝis pluraj iom similaj terminoj pri la sama aĵo – kiu el ili venkos.

Prof. Lindstedt klarigis la diferencon inter “vorto” kaj “radiko”. Ekzemple “dom-” estas radiko, sed “domo, domaĉo, domano, endomiĝi” ktp. estas vortoj. En vortaro “kapvortoj” estas vortoj en alfabeto ordo, laŭ kiuj ni serĉadas tradukojn por niaj pensaĵoj. Dikigas la vortaron ne nur la nombro de la kapvortoj sed ankaŭ la ekzemploj pri ties nuancoj, stilo kaj uzado en frazoj, la kvalito de la papero kaj la grandeco de la tiparoj (presliteroj). Du vortaroj povas aspekti same dikaj sed enhavi malsaman nombron de kapvortoj. La manko de ekzemploj pri la uzado de iu vorto povas esti miskomprenojn aŭ almenaŭ ĝeni la vortar-uzanton. Por “bona vortaro” estas diversaj kriterioj.

Per la verbo “kiusata” estis montrita la bezono precizigi la diversajn signifojn de unu verbo kaj klarigi tion per ekzemplaj frazetoj. Oni uzu almenaŭ 5 Esperanto-verbojn por traduki la finnan “kiusata”: lapset kiusaavat toisiaan (inciti), työpaikalla kiusataan (turmenti), asiat kiusaavat minua (ĉagreni), haitata (ĝeni), Saatana kiusasi Jeesta (tenti). En la vortaro la ekzemploj kompreneble estas dulingvaj. Prof. Lindstedt rimarkigis, ke la grupo laboranta por nova Finna-Esperanta vortaro celas vortaron de 50 000 kapvortoj, kian finnoj ofte nomas koulusanakirja, sed la kvanton de la ekzemploj oni ne ankoraŭ decidis.

Riitta Hämäläinen kaj Jorge Camacho, el la vortarista grupo, detale priskribis siajn labormanierojn kaj problemojn. Tute ne sufiĉas kopii vortojn el jam ekzistantaj diverslingvaj vortaroj, sed unue oni devas decidi, kiuj vortoj estas la plej bezonataj. Krome, ne ĉiam facilas ekscii, ĉu jam ekzistas vorto ekzemple por ”suu- ja sorkkauti” aŭ ne, kaj se ekzistas pluraj terminoj, kiun el ili elekti (buŝ-hufa malsano, hufbuŝa malsano aŭ afta febro/malsano).

Kelkfoje la vortaristo mem devas krei novan radikon, sed ne arbitran, hazardan. Oni devas koni ankaŭ la stilon de la vortoj, ĉu beletra, poezia, ĉiutaga, slanga, scienca ktp, kaj oni pripensu la diversajn signifojn de unu vorto, ekz. de ”aika” kaj ”antaa”. En finna-finna vortaro vi trovos surprize multon pri ili! Post la vortprovizaj prelegoj la partoprenantoj dividiĝis en 3 grupojn por esperantigi finnlingvajn novaĵojn, poemojn, kantojn, komiksojn kaj pridiskuti jam pretajn tradukojn.

Malgraŭ la malvarma vento multaj partoprenantoj konatiĝis kun la urbo, serĉante literojn el monumentoj kaj tabuloj por solvi enigmaĵon, kiu fine klariĝis kiel ”Eterna lernanto”. La unuan premion en la lotumado gajnis Raimo Tuisku. La enhavoriĉa sabato finiĝis per restoracia vespermanĝo kaj ludado, kie oni konatiĝis kun la Sufiksoludo de Jukka Vaijärvi, Glosa-Blago de Sten Johansson kaj konkursa vortodivenado helpe de ŝlosilaj priskriboj kaj sinonimoj.

Dimanĉo

Dimanĉo komenciĝis per matena preĝo organizita de KELF.

La jarkunveno de EAF okazis la 18-an de marto. Carola Antskog estis elektita kiel prezidanton kaj Heta Kesälä kiel protokolanton

de la kunveno. Komence de la kunveno la estraro publikigis, ke ĝi denove post kelk-jara intertempo prijuĝis Esperanto-aganton de la Jaro. La premion ricevis Riitta Hämäläinen pro sia ŝlosila kontribuo al la tre sukcesa KEF-2000 projekto. La premio inkluzivis diskojn de Eurokka. Sekve la kunveno havis silentan paŭzon kondolence al Raimo Pystynen, kiu forpasis antaŭ nelonge.

La jarkunvenaj raportoj de la estraro: agadraporto kaj financa raporto por la jaro 2000 estis aprobitaj sen gravaj ŝanĝoj. Same agadplano kaj buĝeto por la nuna jaro.

Jukka Laaksonen estis elektita kiel prezidanton de la asocio por la jaro 2001. Kiel estraranojn reelektiĝis Anna Ritamäki kaj Tiina Oittinen kaj Anna-Liisa Heikkinen anstataŭas Seija Kettunen, kiu volis retiriĝi. Vic-estraranoj estas tute novaj: Eila Martin, Raita Pyhälä kaj Jukka Vaijärvi.

Kiel revizoroj daŭrigas Heta Kesälä kaj Erkki Kemppainen kaj Seija Kettunen estis elektita vic-revizoro anstataŭ Eila Martin. Alia vic-revizoro estas Marja-Liisa Parpala.

Membrokotizoj de la asocio restas senŝanĝitaj: 100,- por individua membro, 15,- por asocia membro kaj 7,- por asociaj membroj de FEJO kaj Steleto.

Kiel estraranoj de Fonduso Propra Ejo daŭrigas Irma Heikkilä kaj Harri Laine.

Post la jarkunveno okazis informada duonhoro: Riitta Hämäläinen prezentis la venontajn Aŭtunajn Tagojn kaj Jukka Laaksonen la venontajn somerajn kursojn. Posttagmeze Jorge Camacho prelegis pri la temo “Tradiciaj vortoj kaj neologismoj – ĉu eblas esprimi ĉion?”

Lasta vera programero de la tagoj estis Vortkonsilio. La konsilio konsistis el Riitta Hämäläinen, Jorge Camacho kaj Jukka



Jorge Camacho, Anna Ritamäki, Riitta Hämäläinen kaj Seija Kettunen.

Kimmo Sasi luennoi Tampereen filologian laitos II:lla: ”Kieliriidat ovat osa EU:n arkipäivää”

Ulkomaankauppaministeri Kimmo Sasin mukaan esimerkiksi ulkoasiainministeriössä yhä harvempi nuori virkamies hallitsee hyvin puhuttua ja kirjoitettua ruotsia; englannin ja ranskan taidot ovat sen sijaan kohentuneet. Syy heikentyneeseen ruotsin taitoon on niin sanottu EU-vaikutus.

Suomen ulkopolitiikan keskeinen viitekehys ennen EU-jäsenyyttä oli pohjoismaiden yhteistyö. Pohjoismaiden Neuvostolla ei ole kielipykälää, mutta suomi ja islanti käännetään virallisessa vuosikokouksessa. Ruotsin kielen taito edistää norjan ja tanskankin ymmärtämistä. Nyt Bryssel on korvannut Pohjolan, ja suomen kielen vaikutus Pohjoismaiden Neuvostossa on lisääntynyt, koska suomalaiset tottuivat Brysselin-kokouksissa vaatimaan tulkkausta.

Sasin mukaan kieliriidat ovat EU:n arkea. Syyt ovat moninaisia: milloin joku rikkoo yleisesti hyväksyttyä käytäntöä, milloin ongelmana ovat kiistanalaiset henkilöt jne. Tulenarkaa kysymystä käsitellään silkkihan-sikkain.

Koska tulkkauskielisyksestä EU:ssa ei ole olemassa tarkkoja sääntöjä, joustavuus

ja suvaitsevaisuus nousevat avainasemaan. Sasi mainitsee esimerkkinä Suomen puheenjohtajakauden, jolloin saksan kielen käytöstä nousi kohu. Sasi toteaa, ettei kyseessä ollut Suomen ja Saksan välinen konflikti, vaan pikemminkin saksan sekä espanjan ja italian kielten rooli EU:n epävirallisissa kokouksissa. Kielikohun taustalla vaikutti myös EU:n kahden edeltävän puheenjohtajamaan, Saksan ja Itävallan, saksankielisyys. EU:n suurin maa Saksa onkin Sasin arvion mukaan ”hankalin” maa kielikysymyksessä.

Vuodenvaihteessa alkanut Ruotsin EU-vetovastuu tulee kielinäkökulmasta olemaan Suomelle ongelmaton, verrattuna esim. Nizzan-kokoukseen, jossa Ranska jyräsi myös kielikysymyksessä. Tässä piilee Sasin mukaan koko ongelman ydin: kieli ei ole vain kommunikaatiota, se ilmentää myös arvovaltaa. Niin sanottujen statuskielten lukumäärä on aina ollut rajallinen ja ne heijastelevat alueellisia valtakeskittymiä.

EU:n laajentuminen asettaa Sasin mukaan kieliasetelman koetukselle, sillä jokainen maa tulee neuvottelupöydässä pitämään ▷

Laaksonen, kiuj kun prezido de Anna Ritamäki klopodis eltrovi trafajn tradukojn por finnlingvaj vortoj kolektitaj de la publiko. Pridiskutitaj estis aktualaj vortoj k.ekz. bisnesenkeli, pyykkilautavatsa, sauvakävely, sohvaperuna, doping, hakkeri, kuntoliikunta, pulla kaj heräteostos. La tradukoj esperable aperos en la nova vortaro.

La lasta programero estis tradicia posttagmeza kafo, dum kiam lokaj esperantistoj (precipe Marjatta Niemi, Eila Dahlman kaj Kati Lindell) estis aplaude dankitaj kaj ricevis malgrandan subvencion por sia venonta aktivado.

*Raportis Raita Pyhälä (sabato)
kaj Jukka Laaksonen (dimanço)*

Toimittajan kotijumala

Francis Wheen: Karl Marx
Suom. Aarne T. K. Lahtinen
Otava. Keuruu 2000
ISBN- 951-1-16826-6

Karl Marxista kerrotaan paksuja ja paksusti, ortodoksisesti ja juoruillen. Neutraalisti häneen harva suhtautuu. Francis Wheenin Marx-elämäkerta on noin 400-sivuinen, mutta ei oikeaoppinen, ja juoruilevuudesta huolimatta asiatiedot pitävät kutinsa. Löysin kaksi kohtaa kirjasta, jotka kiinnostivat minua esperanton harrastajana:

”Valtiottomina kosmopoliitteina miehet (Karl Marx ja Friedrich Engels) kehittivät oman kielensäkin, eräänlaisen siansaksan, jossa oli aineksia englannista, ranskasta, latinasta ja saksasta. Olen yrittänyt tulkata tämän kirjan Marx- ja Engels-sitaatit ymmärrettävälle (englannin)kielelle, jotta lukija välttyisi Marxin koodien avaamiselta, mutta panen silti tähän esimerkiksi yhden lauseen, joka paljastaa millaisen työn ja tus-

kan takana kirjeiden avaaminen on ollut. ”Diese excessive technicality of ancient law zeigt Jurisprudenz as feather of the same bird als d. religiösen formalitäten z. B. Auguris etc. od. d. Hokus Pokus des medicine man der savages.” Engelsillä ei ollut mitään vaikeuksia ymmärtää tätä solkotusta, ja mikä ihmeellisintä, hän oli yhtä taitava tulkitsemaan Marxin toivotonta käsialaa kuin Jenny-vaimo. Noita kahta lukuun ottamatta siihen pystyi vain ani harva repimättä tukkansa kokonaan irti päästään. Marxin kuoltua Engels joutuikin pitkään antamaan tunteja Marxin käsialan tulkinnassa Saksan sosiaalidemokraateille, jotka halusivat panna johonkin järjestykseen vainajan vielä julkaistemattomat paperit.”

Esperantokin mainitaan seuraavassa katkelmassa: ”Marxin suuri ja hyvin järjestäytynyt vallankumousarmeija oli nimittäin olemassa pelkästään herkästi innostuvien poliitikkojen ja päätoimittajien korvien välissä. Heti kun Pariisin kommuuni oli murs-

▷ kiinni omasta kielestään. Sasi näkee realistisimpana vaihtoehtona johdonmukaisen linjan jatkamisen ja yleisesti hyväksytyjen käytäntöjen huomioon ottamisen. Sasi painottaa, että oleellinen seikka EU:ssa on toimivuus ja tehokkuus myös kielellisesti. Hän vertaa tilannetta YK:hon, jossa on vain kuusi virallista kieltä. Keskusteltaessa työkielistä pitää kuitenkin tunnustaa kielten tasavertaisuus. Jos kääntämisen taso heikkenee, vaarana on Sasin mukaan, että moni maa, esimerkiksi Ruotsi, siirtyy käyttämään englantia. Tulevaisuus näyttää, mitkä kielet vakiintuvat ja miten monikielinen EU:sta tulee.

Englanti EU:n ”lingua francana” tulee kuitenkin jatkossa entisestään vahvistumaan, Sasi tiivistää.

Eurooppa-asioita hallituksessa hoitava Sasi esitelmöi filologian laitos II:lla 29. tammiukuuta otsikolla ”Ruotsin kielen merkitys pohjoismaisessa yhteistyössä ja kielten merkitys EU:n yhteistyössä”. Sasilla itsellään on vankka kokemus pohjoismaisesta yhteistyöstä; kosketuspintaa hän on mm. hankkinut toimimalla aktiivisesti Pohjola-Nordeniassa sekä Pohjoismaisessa Ministerineuvostossa.

*Teksti: Harry Lönnroth,
 pohjoismaisten kielten tutkija*

kattu, myös Internationaali alkoi osoittaa ensimmäisiä hajoamisen merkkejä.

Sen Ranskan-osastolta riistettiin lain suoja ja sen jäsenet joko tapettiin tai laivattiin kaukaisiin vankisiirtoloihin, kuten Uuteen-Kaledoniaan. Englannissa ammattijärjestöjohtajat joutuivat Gladstonen liberaalipuolueen kuolemansyleilyyn, ja useimmat Amerikan sisarjärjestöjen jäsenistä ajautuivat henkienmanaajasisarten Victoria Woodhullin ja Tennessee Claflinin porvarillisiksi opetuslapsiksi ja alkoivat harrastaa spiritismia, kuolleiden manaamista, vapaata rakkautta, ehdotonta raittiutta ja opiskella esimerkiksi maailmankieltä esperantoa.”

Miksi Marxia kannattaa lukea myös nyt? Huolimatta Marxin seuraajien kliseitä tihkuvasta tyylistä, itse oppi-isä Marx oli tyyli-mestari ja hyvin Lawrence Sternin teoksen Tristram Shandy puhkilukenuk, sillä Sternin nyrjähtäneen tyylin hän otti käyttöön kapitalismia kuvatessaan. Sterne oli ensimmäisiä ns. kokeellisia kirjailijoita, James Joycen edeltäjä. Marxin paradokseihin moni hänen seuraajansa on lyönyt lopullisesti pänsä lukkoon. Marxin huumoria ikävä kyllä monetkaan kommunistit eivät ole ymmärtäneet. Nykyisin kun kommunikatyylit ja viihteelliset, rupattelevat tyyli ovat yleisimpiä lehdistössämme, voisi Marxilta ottaa oppia siitä, miten veretseisauttava jutunaloitus oikein tehdään.

Marx voisi olla jokaisen päätoimittajan kotijumala, vaikka hän tuskin itse ateistina olisi suositellut moista sanaa käytettäväksi. Neue Rheinische Zeitungista Karl Marx siirtyi useiden muidenkin julkaisujen päätoimittajaksi ja hän toimi kirjeenvaihtajana amerikkalaisille lehdille. Myös tiedonhaun esikuvana Marx voisi toimia. Viettihän hän useita vuosikymmeniä tutkien British Muse-

umin kirjaston aarteita. Karl Marx oli filosofian tohtori ja aikansa tiedemies, jonka kanssa Charles Darwinkin oli kirjeenvaihdossa. Voisiko tyyliseikat ottaa huomioon nykypäivänäkin tutkielmaa tehdessään, ilman että joutuisi leimatuksi epätieteelliseksi?

esperantanen

Groteske pri naziismo

*Günter Grass: La lada tambureto
Serio Oriento-Okcidento n-ro 33
Eldonejo KLEKS, Bielsko-Biala 2000
ISBN 83-7194-079-3*

Pri absurda periodo eblas rakonti nur absurde. Post Auschwitz ne eblas beli. Nobelverkisto de la jaro 1999 Günter Grass aperigis sian unuan romanon ”Die Blechtrommel”, heredanton de la ĝis tiu tempo verkita Erzählkunst (rakontarto, prozo) en 1959. La aperigo estis skandalo. Tiel grandan abismon traboris la romano ”Lada tambureto“ en la menson de la publiko, kiu ĝis osto estis plenŝtopita per nazia, heroismon eluzanta propagando dum la tria regno.

Feliĉe Grass vekis per siaj rakontoj tiujn kaŝitajn flankojn, pri kio oni prefere ne parolis. Kaj konsciencon, kies plej grava malamiko ŝajnas esti la propagando. Kaj germanoj vekigis el profunda dormo de neparoleblaj aferoj al renkonstrua periodo.

La pikareskromano ”Lada tambureto” rakontas pri Oskaro Matzerath, paciento en azilo por mense malsanaj. Kiel trijara knabo Oskaro decidis ne adoltiĝi. Li aranĝis handikapitecon per falo de ŝtuparo. Tutan sian vivon Oskaro tamburis per tambureto, ludilo por infanoj. Oskaro havis unu supernaturan

talenton, lia voĉo frakasis ĉion el vitro, precipe se iu volis forpreni lian ladtambureton.

Oskaro ne evoluas dum la rakonto. Li restas groteska simbolo kaj monstro per kio la verkisto povas ridi al ĉio absurda en nia moderna socio. La tradukon faris Tomasz Chmielik. Li tradukis ĉ. 60 verkojn en Esperanton el la pola, germana, rusa, angla, hispana, juda, sveda kaj la japana. Estis plezuro recenzi ĉi-tiun tradukon, ĉar malgraŭ du etaj preseraroj la traduklaboro estas bonkvalita, eĉ majstra.

esperantanen

Espero en multoblo

Tivadar Soros: Maskerado

Dancing around Death in Nazi Hungary

Forewords by Paul & George Soros

Edited and translated from Esperanto by Humphrey Tonkin

Canongate, Edinburgh 2000

ISBN 1 84195 062 9

Angla libroklubo ofertas biografion originale verkitan en Esperanto al granda publiko. Soros estas konata nomo inter eg-investistoj. Ankaŭ la finna ŝtato tion scias. Sed la familia historio tre interesas ankaŭ malriĉulon. Tivadar Soros havis multoblan vivon. Unue kiel militprizonigito en Siberio. Fuĝo el prizono tra Orient-Eŭropo al Hungario. La nazia reĝimo tie. Post la socialisma Hungario. Fuĝo dum Hungara revolucio 1956 al Usono, Novjorko. Redaktoro de esperantlingva literaturrevuo Literatura Mondo. Profesie juristo. Sed matura persono por tiel multflanka biografio. Humphrey Tonkin tradukas al tre klara angla. Tiel ke la espero ne perdiĝas.

esperantanen

“Virino estas nulo, se apud ŝi ne staras viro kiel cifero pleniganta”

Eliza Orzeszko: Marta

Rakonto 256 p., kvina eldono

Eldonejo KLEKS de Georgo Handzlik, kunlabore kun UEA, kadre de Kampanjo 2000

Eliza Orzeszkowa (1841-1910), polino, verkis sociajn romanojn pri maljustaĵoj de la tiama socio. “Martan” ŝi nomas nur rakonto kaj demandas al si, ĉu la subtilgustaj legantoj kaj impresavidaj legantinoj pardonos al ŝi la libron, kiu tute ne enhavas misterajn nodojn de intrigo kaj interesajn vidaĵojn de koroj trapikitaj de flamaj sagoj. El la paĝoj de “Marta” pikas nin la socio, kie virino servu kiel amuzilo al viro aŭ sidu hejme, gardusian mastrumaĵon, eduku siajn infanojn kaj glori Dion. En tiu socio beleco, mildeco, modesteco, obeeco kaj pieco estas la virtoj, kiuj konvenas al virino. La sola merito konvena al ŝi estas amo por la edzo. Tiel estis ne nur en Varsovio, kiu rolas kiel la scenejo de la rakonto.

Laŭ tiuj principoj estis edukita, dorlotita kaj amata la bela kaj juna Marta, kiel floro en oranĝerio. Ŝi estis konsiderata ankaŭ klera, ĉar ŝi lernis iomete pianludi, desegni kaj paroli france. Ŝi havis belajn vestaĵojn kaj bonan guston. Ŝi havis gepatrojn, edzon kaj ĉarman filineton, kiuj amis ŝin, sed la gepatra bieno estis vendita en aŭkcio kaj la edzo subite mortis, ne ŝparinte ion por la venontaj bezonoj de la senhelpa edzino. Restas nur la du nuloj, Marta kun la kvarjara filino, kiuj ne tuj komprenas, ke sen viro ne ekzistas por ili feliĉo nek pano.

La personoj de "Marta" reprezentas diversajn situaciojn kaj postenojn en la socio. Ili kvazaŭ ne havas individuan karakteron. La filino de Marta eĉ ne havas nomon. Inter la aliaj personoj la leganto trovas kelkajn, kiuj bonkore kompatas kaj deziras helpi Martan. Tia estas Klaro, ne-edzinigita virino malbeligita de variolo sed sendependa pro sia lerto en laboro. Klaro eble estas modelo, kiun la verkistino kun admiro prezentas al serioza leganto. Legante la libron saĝaj gepatroj certe ekpensis, kiel kaj kial eduki knabinon. Multaj homoj tute ne komprenas la situacion kaj konduton de Marta. Ili mokas, kondamnas kaj ekspluatas ŝin.

Tiutempe mankas la socia sekureco, kaj preskaŭ ĉie regas la kutimo dungi nur virojn, eĉ kiel komizojn en tolaĵo-vendejo. Nur viroj scias kalkuli, mezuri, esti akurataj, trakti diversajn klientojn. Nur viroj vekas estimon, kaj virinoj – kontraŭe! Virinoj estas konsiderataj senkapablaj, facilanimaj, frivolaj, ili kompromitus la entreprenojn. Ne decas, ke ili laboru inter viroj.

Marta povoscias nenium metion. Ŝi provas fariĝi guvernanto, sed ŝia lernantino superas ŝin en la franca. Ŝi provtradukas libron por urĝa eldonado, sed ŝi devas aŭdi, ke al ŝi mankas la bezonataj vortaro kaj stilo. Por servi en ies hejmo ŝi estas tro maldika kaj delikata, kaj ankaŭ pro ŝia deveno ŝi estas konsiderata netaŭga kaj nefidinda en balado kaj gladado. Ŝi ne scipovas altranĉi kaj maŝinkudri vestaĵojn. Denove kaj denove Marta estas rifuzita.

Almozpetadon Marta abomenus. "Almozo estas pano venena kaj putriga por homoj junaj kaj sanaj." Amikino provas klarigi al ŝi, ke la nura solvo estus vendi sin, sian junan virinan belecon, al amavidaj viroj. "La gaja Aleĉjo" pagus kiom ajn por posedi ŝin.

Por tiaj viroj delogi knabinon – Marta estas nur 24-25-jara kvankam vidvino – "estas kiel krevigi nukson", nur por ĝuo, sed edziĝas ili nur al riĉo kaj famo. La koro de tia viro estas vulkano, kiu "eksplodas kelke da fojoj en tago". Ilia alproksimiĝo kompromitas la virinon. En la koro de Marta "staras altaro por la mortinta edzo" kaj "brulas lampo plenigita de larmoj", prilumante ŝian malgajan vojon al mizero. Ŝian filinon ŝi ne povas vivteni. Ili ambaŭ velkas kaj malsaniĝas pro nesufiĉaj nutro, dormo, varmo kaj aero. Ĉiuj flametoj de espero estingiĝas unu post la alia.

Ne min kulpigu pri la romantika stilo. Mi spegulas la stilon de Orzesko/Zamenhof, kiu esperantigis la libron. La unua E-lingva eldono aperis en 1909, iom antaŭ la morto de Orzeszko. La rakonto vekis grandan intereseon en pluraj landoj kaj stimulis virinan movadon, emancipiĝon ankaŭ en Ĉinio kaj Japanio, kie la tradukoj baziĝis sur la Esperanta. "Marta" kontribuis al virina memstarigo, klarigante ke ankaŭ knabinoj devas esti kapablaj elturniĝi en la mondo.

La lingvo de "Marta" kompreneble estas flua zamenhofa Esperanto, sed la libron makulas kelkaj bedaŭrindaj preseraroj, devigante la leganton halti kaj pensi, ĉu "lakto" devus esti "fakto", "pio" "pro", "do"/ "de", "kalke"/"kelke", "apero"/"afero" kaj tiel plu. Kelkfoje ankaŭ la interpunkciado konfuzas. Tio estas ĝena, sed se oni scivolas pri la situacio de la virino en la 19a jarcento kaj pri la kvalito de la lingvo de Zamenhof mem, oni tralegos la libron kun nehaltigebla intereso. Kiel virino mi dankas al la verkistino pro verko grava ankaŭ por mia sorto.

Saliko

Ĉu ekzistas esperanta folkloro?

Antaŭ jaro oni intervjuis min pri esperanto por la helsinka radiostacio *Radio City*. La intervjuisto, *Jarkko Luoma*, demandis min surprize: Ĉu ekzistas esperanta folkloro? Mi antaŭe neniam pensis pri ĉi temo kaj iom balbute rakontis pri kelkaj bagateloj. Sed por mi, iama studento pri folkloristiko, ĉi demando insiste restis en la kapo.

Esperanta folkloro estas kampo ne pristudita. Dum abundas studoj lingvaj kaj historiaj, preskaŭ mankas studoj pri la parolkomunumo, studoj sociologiaj kaj speciale studoj folkloraj. Parolkomunumo tiom vasta geografie kaj tiom mal-

kohera pluraspekte certe ne estas la plej facila studkampo. Ĉu elirpunkte pli trakti Esperantujon kiel hobian rondon aŭ kiel etnon... certe ne etno, sed pli da etnaj trajtoj ol en golfklubo?

Bedaŭrinde mi ne trovas sufiĉajn tempajn eblojn "lonrotumi" (vagi kiel *Lönrot*) tra Esperantujo, kolekti aŭtentikan materialon sisteme, enketadi kaj intervjuadi. Tiel ĉi suba ne prezentos al vi profundan folkloran studon, sed nurajn pensojn, impresojn kaj observojn kaj kelkajn gvidliniojn al la temo. Se ili vekos diskuton kaj mi ricevos respondojn al kelkaj demandoj, bonege.

Kio estas folkloro?

La vorton *folkloro* oni facile, sed false ligas al pratempeco, kamparaneco, maledukiteco kaj al kiĉaj kliŝoj pri popoldancantoj, naciaj kostumoj kaj deklamantoj de kalevalaaj poemoj. Tamen folkloro kaj folklorajoj same apartenas al la moderna mondo kaj ni ĉiuj estas – eĉ se senkonscie – uzantoj de folklorajoj.

La vorto folkloro devenas de vortoj "*folk*" (popolo) kaj "*lore*" (heredita tradicio). Ĝi signifas popolan kulturon. Folklorajo povas esti same bone popolfabelo aŭ pratempa plorkanto kiel infana ludpoemeto, imago pri najbaraj popoloj, urba legendo pri kato en mikroforno aŭ ŝerco pri niaj politikistoj.

Homgrupo estas folkloro unuo

Kiam ni parolas pri popola kulturo, ni memoru, ke "*popolo*" ne nepre signifas tutan nacion, sed povas esti kiu ajn grupo da homoj kun ia komuna bazo. Povas temi pri popolo de tuta Eŭropo,

popolo de unu sola lando, de certa aĝgrupo en la lando, pri lernantoj de certa lernejo, pri enloĝantoj de iu urbo aŭ vilaĝo, pri homoj de certa laborejo, sportklubo aŭ ajna alia hobia rondo. Popolo povas signifi eĉ tre malgrandan rondon, konsistantan el nur kelkaj personoj. Ekz. unu sola rokbanda aŭ hospitala ĉambropleno da pacientoj povas formi propran folkloran unuon. Ĉiuj tiuj grupoj havas sian folkloron.

Ni ĉiuj apartenas al pluraj grupoj. Ni estas eŭropanoj, finnoj, familianoj, reprezentantoj de niaj aĝoj. Folklorajoj kiuj estus absolute samaj por ĉiu finno, egale ĉu infano aŭ pensiulo, ĉu vilaĝano aŭ helsinkano ne nepre ekzistas.

Ankaŭ esperantistoj evidente formas homgrupon, kiu havas plurajn subgrupojn. La elira supozo sekve estas, ke ankaŭ esperantistoj devus havi sian propran folkloron. Tamen paralele al la ĉi supra mencio, esperantaj folklorajoj ne nepre estas la samaj por ĉiuj esperantistoj en la mondo, same por eŭropanoj kiel por ekster-eŭropanoj, same por junularo kiel por oldularo.

Buŝa kulturo senaŭtora

Folkloro signifas buŝan kulturon, male al la literatura tradicio. Pratempe oni rakontis dum mallumaj vesperoj fabelojn kaj longajn epikajn poemojn por distri sin. Tiuj poemoj apartenis al buŝe heredita tradicio, ili ne aperis libroforme. La rakontistoj ofte eĉ ne scipovis legi. Same nuptotradicioj aŭ kredo je feoj kaj koboldoj ne aperis libroforme, sed en la buŝa, praktika tradicio. Ili herediĝis de generacio al alia aŭ de grupo al alia. Tiel ankaŭ la nunaj folklorajoj: De kontinento al alia, de lernejo al alia, de pli aĝaj infanoj al pli junaj.

Karakterizaĵo de folkloro estas ankaŭ ĝia anonimeco. Folklorajoj ne havas aŭtoron. Oni ne povas ligi iun rakonton, ŝercon aŭ anekdoton al difinita persono. Folklorajoj naskiĝas kaj cirkulas en la grupo kaj havas nebulan originon.

Nuntempe la limoj inter buŝa kaj literatura tradicio jam ne plu estas tute klaraj. Ŝercoj pri blondulinoj, basistoj aŭ pri *Bill Clinton*, unue vivaj nur en la buŝa tradicio, baldaŭ eksplode disvastiĝas rete aŭ aperas baldaŭ kajerforme.

Kampoj de folkloro

Sekve mi uzos diversajn kampojn de finna folkloro kiel skeleton por pli facile trovi esperantajn folklorajn fenomenojn, eĉ se estas parte absurde provi trovi paralelojn inter fenomenoj de finna folkloro kaj tiu de hobia grupo – nu, ni vidu.

Popolpoezio

Popolpoezion oni povas dividi en tri grupojn: Al epika (rakonta) poezio, al lirika (presenta) poezio kaj al rita poezio. Epika popolpoezio pri herooj, samkiel lirikaj plorkantoj en la moderna mondo estas jam mortaj tradicioj. Sed almenaŭ en nia finna popola tradicio rita poezio plu havas rolon. Temas pri tiuj etaj rimoj, kiujn oni ofte eĉ ne konceptas kiel poezion: Dirajoj kiujn oni uzas en konkreta ĉiutaga situacio ("*Etana, etana näytä sarves onko huomenna pouta*", "*Anna, Antti, ahvenia*") aŭ la tuta ludpoezio kaj mokpoezio de infanoj ("*Vasta pesty puhdas selkä,*

kuka siihen viimeks pisti, likaisella sormellaan...", "*Ota kiinni, mandariini, kandariini kanda*").

Ĉu rita poezio ekzistas en esperanto? Se iam naskiĝintus tradicio, ke enirante la kongresejon LKK-anoj silente suspirus "*Je animoj de Zamenhof, Grabowski kaj Kabe, iru la kongreso glate*", temus pri rita poezio. Sed tiel oni ja ne agas.

Naskiĝo de infana (Bone rimarku: De infanoj mem, ne kreita de plenkreskuloj) lud-kaj mokpoezio bezonas koheran grupon kaj oftan kontakton inter la grupanoj. Ĝi naskiĝas dum kortaj ludoj kaj konfliktoj aŭ en infanĝardenoj. Eĉ se ja ekzistas esperantaj denaskuloj, kiuj sendube ludas kaj inter si konfliktas esperante, ĉu kontaktoj inter tiuj infanoj estas tiom oftaj, ke ili havas la eblon krei inter si rimojn por ludoj kaj moko?

Rakonta tradicio

Rakonta tradicio kutime floras ĉiufolklore. Al rakonta tradicio apartenas rakontado de fabeloj – modernmonde jam morta tradicio (Ne miksu kun legado aŭ rakontado de fabeloj de Grimm!) –, ŝercoj, klaĉoj, rakontoj kaj legendoj.

Nu, klaĉoj ĉiumedie ekĝermas kaj disvastiĝas, ankaŭ esperante. Aŭ ĉu vi ne jam aŭdis, kio VERE okazis en la salono Fritzon meznokte dum KEF....?

Same certe ŝercoj. La plej fekundaj kampoj por naskiĝo de ŝercoj estas kutime najbaroj, politikistoj aŭ aliaj gravaj homoj kaj instancoj. Nur pensu, kiom da ŝercoj vi jam aŭdis pri *Ahti Karjalainen*, *Martti Ahtisaari*, *Bill Clinton* aŭ pri svedoj kaj rusoj.

En Esperantujo ni povus trakti UEA:n, CO:n aŭ EAF:n kiel "politikistojn". Ankaŭ *Zamenhof* mem devus esti bona grundo por ŝercoj. Najbaran valoron povus porti volapuko kaj ido.

Sed mi malbone konas ŝercojn por rakonti al vi konkretan ekzemplon. Tamen io pure esperanta devas ekzisti. Ĉu vi ne aŭdis ion pri *Jukka Laaksonen*, *Päivi Saarinen* kaj *Seija Kettunen*,

kiuj renkontiĝas en kafejo por trakti la protokolon punkton 6? Aŭ pri idisto, volapukisto kaj esperantisto kiuj bierumas dum kongreso? Kion diris Zamenhof al Grabowski survoje al klub-vespero?

Legendoj estas rakontoj pri sanktuloj kaj sanktaj temoj, rakontoj siaflanke estas traktataj kiel vero. Rakontoj kompreneble en Esperantujo ekzistas. (Vidu pli sub "Memora tradicio")

Ĉu legendoj ankaŭ? La funkcio de legendoj estas firmigi kredon de iu grupo pri certa fenomeno. Pratempe oni legendumis kaj rakontadis pri renkontoj kun feoj, koboldoj, diabloj kaj tiel firmigis la kredon pri ekzisto de tiuj estaĵoj. Kio pri la rakonto pri naskiĝo de esperanto? "Jam infanaĝe Zamenhof ekkomprenis la gravecon de komuna, internacia lingvo kaj ties signifon por la monda paco...". Ĉu vere tiel aŭ ĉu jen legendo? Kio se Zamenhof fakte estis simple ambicia homo, ĵaluzeta, kun neniomaj noblaj celoj, volis nur krei lingvon pli bonan ol aliaj tiutempaj planlingvoj kaj hazarde sukcesis pli bone ol la aliaj?! Ĉu ne ĉi tia mallegendo detruus la entuziasmon kaj mondkoncepton de pluraj esperantistoj?

Kaj kiel fakte okazis la naskiĝo de verbo "krokodilo"? Ĉu vere aperis stulta krokodilo en sveda lernolibro aŭ ĉu jen temas pri plia legendo?



Arnau Torras, el albumo "La D-ro Senesperanto serĉas la Bonan Etoson."

Miniloro

Miniloro signifas folklorajon tre kurtforman. Ofte temas pri unu sola frazo. Temas pri popolaj diraĵoj ("Perkele, sanoi pieni poika kun isä kuoli ja äiti haudattiin"), proverboj ("Ruoho on vihreämpää aidan takana"), enigmoj ("Mikä on punainen ja kulkee ylös alas? –Tomaatti hississä.), trompfrazoj ("Sano valas. –No, valas. –Vedä kymmenen kertaa housut alas"), perifrazoj ("heittää veivinsä") kaj komparoj ("päissään kuin käki").

Zamenhofajn proverbojn ni esperantistoj certe konas, sed ĉu ankaŭ folkloraj miniloraĵoj ekzistas? Miniloraĵoj estas ĉiulingve kampo kutime tre prospera. Eĉ infanoj facile uzas kaj kreas diversajn komparojn, perifrazojn kaj enigmojn. Mia 3-jarulino antaŭ ne longe komentis kamenfajron "Sehän syttyi kuin iloinen mieli." aŭ informis min pri sia silentemo: "Mä oon tänään hiljainen kuin maitotölkki."

Perifrazumi kaj enigmumi tamen postulas de la parolanto kaj aŭskultanto tre firman lingvan bazon. Ne nur korekton, sed kreivon kaj spontanon en parolaj kunteksto.

Nu, kiom da perifrazoj vi mem konas esperante? Morta kiel...? Ebria kiel...? Aŭ kiom da esperantistoj vi persone konas, kiuj eĉ teorie kapablas spontane-babile krei esprimivajn komparojn kaj proverbojn? Mi ne konas multajn.

Kelkajn mi aŭdis. Vera perlo jen – ĝi perfekte sekvas formulecon de komparoj kaj aldone havas alludon al pure esperanta medio. Sekve ĝi estas komprenebla nur al homo, kiu bone konas nian movadon: Iu afero estas "pli malversajna ol langa kiso inter Silber kaj Camacho". Alia ofte aŭdita komparo jen: Io povas esti "pli teda ol komitatana kunsido".

Aparta kampo de miniloraĵoj estas t.n. libloro. Tiam la frazo havas beletran originon, sed komencas sendependan vivon eksterbeletran. Ĝi iĝas tiom vaste konata, ke oni eĉ ofte forgesas la beletran originon. Oni parolas ankaŭ pri "flugilaj vortoj". Tre fama ekzemplo estas la frazo "ollako vai eikö olla", sed kiu memoras,

de kiu verko ĝi devenas?

Foje flugilojn havas tuta frazo, foje oni prenas parton de la frazo kaj aldonas al ĝi fremdan elementon. Eble unu el la plej famaj esperantaj libroloraĵoj estas pruntaĵo el la zamenhofa poemo (*"La vojo"*): *"Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante... ni iru al kafejo"*.

Ankaŭ librotitolo povas iĝi folkloriĵo. Jam mi aŭdis la esprimon *"mi estas plena kaj ilustrita"* por esprimi ekz. postmanĝan kontenton.

Denove iom bridas naskiĝon de esperantaj libroloraĵoj la magraj scioj de esperantistoj mem pri nialingva literaturo. Libroloraĵoj kiel *"percepti haŭte bieremon tuja"* apenaŭ naskiĝas, ĉar kiu jam konus la koncernan originalon de *Miguel Fernández!* (Originale: *"Percepti haŭte turto-flugon tuja"*/Fernández/Ibere libere/Tuja, p.103).

Iom pli ni ŝajnas koni la roklirikon, tiel almenaŭ la junularo. Freŝan muzikloran ekzemplon ni trovas tuj en Finnlando. *"Ĉu vi pretas..."* +

fremda elemento jam fulmrapide iĝis flugila frazo dum ĉi somero. Repkantstila demando *"Ĉu vi pretas por la veno de vespermanĝo"* estas tre aktuala ekzemplo pri esperanta folkloro. La originon por tiu frazo oni trovas en la kantoteksto de fama finna espobando, *Dolcxamar*, kiu siarepe demandas *"Ĉu vi pretas por la veno de Dolcxamar"*. (Dolcxamar/Lingvo Intermonda/Ĉu vi pretas) La frazo tamen tuj ekflugis eksterkanten kaj rapide kaj folklore disvastiĝis inter la esperanta junularo kaj muzikemularo.

Esperantaj miniloraĵoj estas ankaŭ kelkvortaj konceptoj kiel *"La bona etoso"* (Origino el la komiksalbumo *"La D-ro Senesperanto serĉas la bonan etoson"* de Arnau Torras), *"La bona lingvo"*, *"Esperanto—edzperanto"*, *"konstanta kongresa edzino"*, *"la fina venko"* (Foje ŝerce *"la finna venko"*) aŭ *"veni, vidi, vici"*. Ankaŭ la fama frazo, ŝajne Raŭmo-origina, *"Ne tuŝu la teknikaĵojn"* estas esperanta miniloraĵo.

Sola

Muziko: Kim J. Henriksen kaj Micke Englund

Teksto: Kim J. Henriksen

En albumoj *"Tute ne gravas"*/Amplifiki kaj *"Brokantaĵoj"*/Esperanto Desperado

Mi pagis kotizon al IJK, sed nenio restis por la vojaĝ'

Mi pensis ke tio tute ne gravas, kaj iris al la voj' kun mia pakaj'

Mi levis la manon, ridetis al la ŝoforoj, sed neniu haltis kaj kunportis min

Post ses horoj en pluvo kaj vento mi frostis tiel

Ĉiuj aŭtomobiloj preterpasis min tiel rapide kaj mi sentis min sola, sola, sola

sola, sola, sola

Mi venis finfine al la kongreso kaj tie

renkontiĝis kun karaj amikoj,

ni kisis, brakumis, kaj estis gajaj,

mun mi estis kun fratoj kaj fratinoj de la tuta mondo,

kaj ne sola, sola, sola

sola, sola, sola

Ĉar ĉi tie mi pensas estas bonegaj etoso, paco, kaj amikeco,

kaj mi kredas ke neniu ĉi tie sin sentas

malgaja, malbela, malamata,

kaj certe ne sola, sola, sola

sola, sola, sola

Poste ni ĉiuj vojaĝis hejmen al niaj landoj en la tuta mond',

kaj nun mi pensas pri miaj geamikoj, kaj

sentas min iom malĝoja, malgaja kaj

iom sola, sola, sola

sola, sola, sola

Imagu se ĉiuj homoj en la tuta mondo lernus esperanton

Povus esti ke tiam neniu iam iel ie sentus sin

sola, sola, sola

sola, sola, sola

Popoldancoj kaj ludoj

Ludoj pratempe estis grava elemento ne nur en infana, sed en junulara kulturo. Sabatvespere la junularo kolektiĝis por svigilado aŭ por rondodancoj. Speciale dancoj estis grava kanalo al tuŝoj kaj erotike saturita etoso.

Klaregan paralelon oni povas vidi kun *”La bambo”*, dancata en junularaj esperantaj rondoj. La danco mem ne estas esperanta folkloro, ofte ni eĉ aŭdas ĝian hispanlingvan version. Sed la tradicio danci bambon kaj la *”ludreguloj”* estas klare esperanta folklorajo.

Temas pri rondodanco. En la mezo de la rondo dancas kelkaj unuopaj knabinoj kaj knaboj. Dumdance la knabinoj iras al iu enronda knabo kaj kisas lin survange (aŭ surbuŝe, laŭkuraĝe), la knaboj iras al knabinoj samcele. La bambon oni dancas eĉ kelkdekfoje sinsekve. Foje ĝi helpas naskiĝon de rilato, al kiu mankis kuraĝo en taga lumo, sen la sekura bambuma rondo. La dancregulojn oni kutime lernas nur buŝe kaj praktike, novulo aŭdas ilin de plispertulo.

Enirante festejon kun bambumantoj, oni je unua rigardo povas distingi inter tiuj, kiuj estas unuafojuloj en la kongreso kaj kiuj jam ĝisostaj movadanoj – nur laŭ la bambumaj paŝoj kaj agoj. Mi plu memoras mian unuan kontakton

kun ĉi furora junulara danckutimo. Okazis en itala *IJF*, junulara festivalo. Mi dancis en la rondo, tuj la unuan vesperon, en mia unua junulara renkontiĝo iam ajn kaj sciis nenion pri la tuto. Subite venas al mi itala knabo, tute ne konata, kaj ekkisas min. Kia ŝoko! Ĉu ĉiuj italoj estas ĉi tiom abrupte spontanaj kaj frenezaj! Nur poste mi lernis agi laŭ la folkloraj atendoj.

La Bambo naskis ankaŭ mokvorton kaj koncepton: *”Bambisto aŭ eĉ eterna bambisto”* estas persono, kiun nenia serioza programo interesas kaj kiu emas nur trabambumi la kongresajn noktojn.

Popolmuziko

Popolmuziko klare en Esperantujo ne ekzistas, eĉ se kelkaj pecoj jam akiris preskaŭ popolmuzikecajn trajtojn kiel i.a. *”IS”* aŭ *”Sola”* de *Amplifiki* (Amplifiki/Tute ne gravas), klasikaĵoj en la junularaj rondoj pri la novjara festivalo en Germanio. Supozeble ne ĉiuj, kiuj kantas *”Sola, soooola, sooooooooooolaaaaa...”* havas ian ajn ideon pri la origino de tiu kanto.

Riitta Hämäläinen

Artikolo daŭros en la sekva numero.

Bardaĵoj por kvietiĝo

Georgo Handzlik:

Ni tostuj la verdan fortunon

Kabaredaj kaj bardaj kantoj

Eldonejo KLEKS, Bielsko-Biala

Georgo Handzlik estas viro kun gitaro prezentante kantojn postulantaj eble la plej fortan memfidon. Tia estas mia voĉo, tiaj miaj tekstoj, prenu aŭ ne prenu mian mesaĝon. Inter muziko, literaturo kaj teatro mezstatas la bardarto. Tio postulas pretecon al emoci-

ŝtormo ĉe aŭskultanto kaj pli intensan koncentriĝon ol ĉie aŭdebla konsummuziko.

En la kantoj *La knaboj de nigra-blanka foto* kaj *Justaj bomboj* Handzlik mesaĝas kontraŭ irrealeco de milito. Grandan emociŝtormon mi sentis ĉe la lasta kanto de la KD, *Ĝis revido*, eble aŭdita dum fermo de multaj kongresoj. Bardarto postulas kvieton, tempon kaj mediteman karakteron. Ĝuste tiaj ecoj ne estas popularaj hodiaŭ. Sed kvietiĝo estas saniga.

esperantanen

La tria internacia fotokonkurso

“La Ondo de Esperanto” kaj Urala Esperantista Societo (UES), post la sukceso en 1998 kaj 1999, organizis en 2000 la trian Internacian Fotokonkurson. La konkurso ne estis dediĉita al iu temo. Partoprenis 62 fotoverkoj de 18 aŭtoroj el 10 landoj: Britio, Bulgario, Finnlando, Hispanio, Hungario, Irano, Litovio, Pollando, Ruslando, Urugvajo. (En 1998 estis 42, kaj en 1999 – 43 konkursaĵoj).

La 17a de januaro 2001 la juĝkomisiono anoncis la rezulton.

1a premio: Andrea Ottrok (Hungario) pro “Infana ĝojo”.

2a premio: Luz Vazquez Sonto (Hispanio) pro “Patrineco”.

3a premio: Robert Kaminski (Pollando) pro “Malnova Jerusalemo”.

Laŭda mencio: Raita Pyhälä (Finnlando) pro “La suno en la lago”.

Specialaj premioj (pro fotoj teme ligitaj kun Esperanto):

Robert Kaminski (Pollando) pro “Pardonu! En Ĉinio nun estas noktomezo”;

Sandra Burgues Roca (Urugvajo) pro “Ankaŭ mi volas lerni Esperanton”.

Laŭ la Regularo de la Konkurso, la kunorganizantoj havas ekskluzivan rajton ĝis la 31a de decembro 2002 uzi ĉiujn ricevitaĵojn fotojn en papera kaj elektronika formo kaj en ekspozicioj.

Dankon al la partoprenintoj! Gratulon al la laŭreatoj!

(UES, La Ondo de Esperanto)

IJK en Strasburgo

Internacia Junulara Kongreso okazos ĉi-jare en Strasburgo, la urbo de Eŭropa Parlamentejo, de la 29a de julio ĝis la 5a de aŭgusto. La temo de kongreso estas “Plurlingvismo en Eŭropo: kiel ĝin sukcesigi?” Laŭteme, okazos malferma *lingvofestivalo*, dum kiu E-istoj el diversaj landoj prezentos sian lingvon. Por tiu kaj aliaj programeroj la organizantoj instigas la partoprenantojn kontribui al la programo. Akceptitaj kontribuontoj ricevos rabaton.

Por aliĝiloj kaj pliaj informoj, kontaktu TEJOn aŭ JEFOn. Rete: <tejo-oficejo@esperanto.org>, <jefo@esperanto.org>, ttt-ejo: <www.esperanto.org/ijk2001>.

IF en Magdeburg

La 18-a Internacia Festivalo okazos en Magdeburg de 27a de decembro 2001 ĝis la 3a de januaro 2002. IF estas aranĝo por “mez-aĝuloj” (25-55 jarojn) kaj junaj familioj, kun aŭ sen infanoj. Je la fino de februaro estis jam preskaŭ 90 aliĝintoj el 13 landoj, do indas aliĝi frue. Plej malaltaj kotizoj (260 eŭroj por pli ol 25-jaruloj) validas ĝis la 30a de junio. La festivalejo estas modernigita kaj komforta junulara hotelo meze en la urba centro, tamen en sentrafika ĉirkaŭo. Je dispono estas diversgrandaj ĉambroj, kun duŝo kaj necesejo en ĉiu ĉambro.

Aliĝiloj kaj pliaj informoj: Hans-Dieter Platz, Postfach 1148, D-34303 Nidenstein, Germanio. Tel/fakso +49 5624 8007. Rete: <hdp@internacia-festivalo.de>, ttt-ejo: <www.internacia-festivalo.de>.

Futbalmaĉo Helsinko-Porvoo 11.5 en Ravirata/Käpylä/Helsinko je la 18a
Pliaj arieruloj, avanculoj, goluloj kaj amasa publiko bonvenas!

Detaloj en www.esperanto.fi/helsinki

Esperantokurssi

Valamon kansanopistossa 1.-5.7.2001

Viime vuonna kesän esperantokurssit järjestettiin onnistuneesti Valamon kansanopistossa. Erinomaisesta opetuksesta ja monipuolisesta ohjelmasta Valamon rauhallisessa ilmapiirissä sai nauttia 29 innostunutta kurssilaista.

Tänä vuonna Sinullakin on mahdollisuus osallistua Valamon kursseihin. Kurssiaika on 1.-5.7.2001. Kurssitasoja on tänä vuonna kolme: alkeet, jatko ja keskustelu. Alkeiskurssilla (taso 1.) tutustutaan kielen perusteisiin ja kurssi antaa hyvät valmiudet jatko-opiskeluun itsenäisesti tai ryhmässä. Opettajana *Sylvia Hämäläinen*. Jatkokurssi (taso 2.) on tarkoitettu kieltä jo jonkin aikaa käyttäneille tai kielen alkeet joskus opineille. Keskustelukurssille (taso 3.) osallistuvat osaavat jo sujuvasti käyttää kieltä kaikissa tilanteissa ja hakevat kurssilta lisävahvistusta kielitaidolleen. *Atilio Orellana Rojas* opettaa sekä jatkokurssia että keskustelukurssia. Keskustelukurssilaiset tekevät itsenäisiä harjoituksia aamupäivisin ja liittyvät jatkokurssilaisten ryhmään iltapäivän tunneiksi. Kaikki kolme ryhmää tekevät yhdessä retkiä Valamon kauniissa luonnossa. Katso tarkemmin oheisesta päiväkohtaisesta ohjelmasta (pienet muutokset ohjelmaan mahdollisia).

Viiden päivän kurssin hinta on hotellitasonisessa majoituksessa 1450 mk (1 hh) ja 1250 mk (2 hh) tai retkeilymajatasoisessa 1150 mk (1 hh) ja 1050 mk (2 hh). Hintaan

sisältyy majoitus, opetus, aamiainen, lounas, päiväkahvi ja iltatee päivittäin sekä viimeisenä iltana juhlaillallinen. Mahdollisuus tulla paikalle jo lauantaina 30.6. ilman eri yöpymismaksua.

Ilmoittautuminen tapahtuu suoraan Valamon kansanopistoon, osoite: 79850 Uusi-Valamo, puhelin (017) 570 1400, faksi (017) 570 1402, sähköposti: <valamon.kansanopisto@valamo.fi>. Opisto lähettää ilmoittautuneille maksulomakkeen ja lisätietoja. Kurssi järjestetään yhteistyössä Suomen Esperantoliitto ry:n kanssa, yhdyshenkilöinä tänä vuonna Tiina Oittinen ja Jukka Laaksonen (osoitteet sivulla 2).

Esperanto-Asocio de Finnlando

Esperantokurso en Valamon kansanopisto (Civitana Instituto de Valamo), Heinävesi, Finnlando, 1.-5.7.2001

Pliaj informoj

Valamon kansanopisto (Civitana Instituto de Valamo), 79850 Uusi-Valamo, tel: (017) 570 1400, fakso: (017) 570 1402, retpoŝto: <valamon.kansanopisto@valamo.fi>.

Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. Interreto: <http://www.esperanto.fi>.

Kontaktpersonoj: Tiina Oittinen <tiina.oittinen@pp.inet.fi>, Jukka Laaksonen <laakju@koti.tpo.fi>.

Päivittäinen ohjelma

Su 1.7.2001

- 10.00 Kurssin avaus, opettajien ja opiskelijoiden esittäytyminen; Kunkin kurssiryhmän avaus (alkeet, jatko, keskustelu)
 11.00 Kiertokävely luostarin alueella ja tutustuminen sen toimintaan.
 12.30 Lounastauko.
 13.30 Alkeiskurssi (Sylvia Hämäläinen)/
 Jatkokurssi (Atilio Orellana Rojas)/
 Keskustelukurssi (oma ryhmä) 2 oppituntia
 15.00 Kahvitauko
 16.00 Alkeet/Jatko/Keskustelu (omissa ryhmissä) 2 oppituntia
 18.00 Tauko
 18.30 Alkeet (oma ryhmä) / Jatko ja Keskustelu yhdessä 1 oppitunti
 19.30 Iltatee, tutustumisilta

Ma 2.7.2001

- 7.00-9.00 Aamiainen
 9.00 Alkeet/Jatko/Keskustelu (omissa ryhmissä) 3 oppituntia
 12.00 Lounastauko.
 13.30 Laivaristeily Juojärvellä ”Sergei”-laivalla (erillinen maksu)
 16.30 Kahvi
 17.00 Alkeet (oma ryhmä) / Jatko ja Keskustelu yhdessä 2 oppituntia
 18.30 Tauko
 19.30 Iltatee, yhteistä ohjelmaa
 19.30-22.00 Saunomismahdollisuus

Ti 3.7.2001

- 7.00-9.00 Aamiainen
 9.00 Alkeet/Jatko/Keskustelu (omissa ryhmissä) 3 oppituntia
 12.00 Lounastauko.

- 13.30 Vaellus matkamiehen ristille (2 km luostarista), jossa kahvit.
 16.00 Tauko
 16.30 Alkeet (oma ryhmä) / Jatko ja Keskustelu yhdessä 2 oppituntia
 18.30 Tauko
 19.30 Saunailta rantasaunalla: makkaraa, virvokkeita, iltatee

Ke 4.7.2001

- 7.00-9.00 Aamiainen
 9.00 Alkeet/Jatko/Keskustelu (omissa ryhmissä) 3 oppituntia
 12.00 Lounastauko.
 13.30 Luontoretki rukousmetsäpolulle ja luostarin hautausmaalle.
 16.00 Kahvi
 17.00 Alkeet (oma ryhmä) / Jatko ja Keskustelu yhdessä 1 oppitunti
 18.00 Tauko
 18.30 Alkeet (oma ryhmä) / Jatko ja Keskustelu yhdessä 1 oppitunti
 19.30 Slaavilainen ilta (juhlaillallinen), yhteistä ohjelmaa

To 5.7.2001

- 7.00-9.00 Aamiainen
 9.00 Alkeet/Jatko/Keskustelu (omissa ryhmissä) 3 oppituntia
 12.00 Lounastauko.
 13.30 Alkeet (oma ryhmä) / Jatko ja Keskustelu yhdessä 2 oppituntia
 15.30 Kahvi. Kurssin päätös

Päivittäin mahdollista osallistua kiinnostuksen mukaan jumalanpalveluksiin aamulla, päivällä ja illalla taukojen yhteydessä.

Esperanto-Asocio de Finnlando

Esperantokurso en Valamon kansanopisto (Civitana Instituto de Valamo), Heinävesi, Finnlando, 1.-5.7.2001

Taga programo

Dimanĉo 1.7.2001

- 10.00 Malfermo de la kurso, la instruistoj kaj gelernantoj prezentas sin; Komenco por ĉiu lernogrupo (elementa, daŭriga, perfektiga)
- 11.00 Rondirado en ĉirkaŭaĵo de la monaĥejo kaj konatiĝo kun ĝi
- 12.30 Lunĉopaŭzo
- 13.30 Elementa kurso (Sylvia Hämäläinen)/ Daŭriga kurso (Atilio Orellana Rojas)/ Perfektiga kurso (en propra grupo) 2 lecionoj
- 15.00 Kafopaŭzo
- 16.00 Elementa/Daŭriga/ Perfektiga (en propraj grupoj) 2 lecionoj
- 18.00 Paŭzo
- 18.30 Elementa (propra grupo) / Daŭriga kaj Perfektiga (kune) 1 leciono
- 19.30 Vespera teo, interkona vespero

Lundo 2.7.2001

- 7.00-9.00 Matenmanĝo
- 9.00 Elementa/Daŭriga/ Perfektiga (en propraj grupoj) 3 lecionoj
- 12.00 Lunĉopaŭzo
- 13.30 Ŝipkrozado en najbara lago (aparta pago)
- 16.30 Kafopaŭzo
- 17.00 Elementa (propra grupo) / Daŭriga kaj Perfektiga (kune) 2 lecionoj
- 18.30 Paŭzo
- 19.30 Vespera teo, komuna programo
- 19.30-22.00 Ebleco saŭni en la loka saŭno ĉe lago

Mardo 3.7.2001

- 7.00-9.00 Matenmanĝo
- 9.00 Elementa/Daŭriga/ Perfektiga (en propraj grupoj) 3 lecionoj
- 12.00 Lunĉopaŭzo
- 13.30 Migrado al la kruco de la migranto, kie komuna kafumado.
- 16.00 Paŭzo
- 16.30 Elementa (propra grupo) / Daŭriga kaj Perfektiga (kune) 2 lecionoj
- 18.30 Paŭzo
- 19.30 Saŭna vespero en la lagborda saŭno: vespera teo kun aliaj manĝaĵoj

Merkredo 4.7.2001

- 7.00-9.00 Matenmanĝo
- 9.00 Elementa/Daŭriga/ Perfektiga (en propraj grupoj) 3 lecionoj
- 12.00 Lunĉopaŭzo
- 13.30 Ekskurso en naturo al arbara preĝa pado kaj monaĥeja tombejo.
- 16.00 Kafopaŭzo
- 17.00 Elementa (propra grupo) / Daŭriga kaj Perfektiga (kune) 1 lecionoj
- 18.00 Paŭzo
- 18.30 Elementa (propra grupo) / Daŭriga kaj Perfektiga (kune) 1 leciono
- 19.30 Festa vespero en slava stilo (festa vespermanĝo), komuna programo

Ĵaŭdo 5.7.2001

- 7.00-9.00 Matenmanĝo
- 9.00 Elementa/Daŭriga/ Perfektiga (en propraj grupoj) 3 lecionoj
- 12.00 Lunĉopaŭzo
- 13.30 Elementa (propra grupo) / Daŭriga kaj Perfektiga (kune) 2 lecionoj
- 15.30 Kafo. Fermo de la kurso
- Ĉiutage ebleco laŭ intereso viziti ortodoksan diservon matene, tage kaj vespere dum la paŭzoj.

Aŭtunaj Tagoj

28.-30.9.2001 en Helsinko

– Lingvoj kaj (mis)komprenoj –

La Aŭtunaj Tagoj 2001 okazos en Helsinko, en la internacia kulturcentro Caisa, kiu situas tre urbocentre, nur je 2-minuta distanco de la helsinka stacidomo. La aranĝo estas ĉi foje 3-taga.

La kerna vorto de la Aŭtunaj Tagoj estas "kompreni". Ni proponas al vi trispecajn komprenojn:

- 1) Kompreni la lingvan diversecon de mondo kaj ĝian valoron
- 2) Kompreni problemojn de internacia komunikado
- 3) Kompreni diversajn facetojn de Esperanto

Ĉefprelegantoj

- ◆ Patrik Austin: finna studento pri nordiaj lingvoj, muzikisto
- ◆ Fabienne Berthelot: franca psiĥo-sociologo
- ◆ Istvan Ertl: hungara verkisto-ĵurnalisto
- ◆ Jouko Lindstedt: finna profesoro, lingvisto, patro de denaskuloj
- ◆ Bertilo Wennergren: sveda gramatikisto

Artistoj

- ◆ Dolcxamar, furora finna bando
- ◆ Istvan Ertl, verkisto-poeto
- ◆ Persone, famega sveda bando
- ◆ Variantoj, teatra grupo konsistanta el junaj finninoj

Prelegoj

Lingva diverseco

En la mondo ekzistas ĉirkaŭ ses mil parolaj lingvoj, kaj miloj da gestlingvoj. Oni antaŭ-

Aŭtunaj tagoj 28.-30.09.2001 en Helsinko

Mi aliĝas al la aŭtunaj tagoj

Nomo _____

Adreso _____

Tel. _____

Aliĝkotizo

Ĝis 30.06.2001 90/60 mk _____

Ĝis 14.09.2001 120/90 mk _____

Poste 150/120 mk _____

La pagintoj havas liberan eniron al ĉiuj aranĝoj ligita al la aŭtunaj tagoj. La dua, malpli kosta kategorio por membroj de FEJO.

Loĝado kaj manĝado

Manĝopaketo 160 mk _____

Deziroj pri manĝoj

Loĝado:

Mi zorgas mem pri mia loĝado

Amasloĝejo (nur por fejo-anoj)

Mi rezervas hotelĉambron jene

Mi pagas _____ mk al la konto
Helsingin Esperantoseura
Sampo 800017-1409105

Sendu la aliĝilon al:
Esperanto-klubo de Helsinko
Siltasaarenkatu 15 C 65
00530 Helsinko

BONVENON!

Syyspäivät 28.-30.09.2001 Helsingissä

Ilmoittaudun syyspäiville

Nimi _____

Osoite _____

Puh. _____

Ilmoittautumismaksu

- 30.06.2001 saakka 90/60 mk _____
- 14.09.2001 saakka 120/90 mk _____
- sen jälkeen 150/120 mk _____

Ilmoittautumismaksun suorittaneilla on vapaa pääsy kaikkiin syyspäivien tapahtumiin. Alempi maksu FEJOn jäsenille.

Majoitus ja ruokailut

- Ruokailupaketti 160 mk _____

Toivomuksia ruokailun suhteen

Majoitusvaihtoehdot:

- Hoidan itse majoituksen
- Yhteismajoitus (fejolaisille)
- Varaan hotellihuoneen seuraavasti

Maksan _____ mk tilille
Helsingin Esperantoseura
Sampo 800017-1409105

Lähetä lomake osoitteella:
Helsingin Esperantoseura
Siltasaarenkatu 15 C 65
00530 Helsinki

TERVETULOA!

vidas, ke 90% el ili mortos dum la nuna jarcento. Tio povas esti rigardata kiel granda perdo por tuthomara kulturo, kvankam multaj homoj trovas ĝin evoluo natura, eĉ dezirinda. Dum la AT ni aŭdos pri la kaŭzoj de la lingvomorto kaj pri ebloj malhelpi ĝin. (Lindstedt)

Nordiaj lingvominoritatoj

Ankaŭ por multaj nordiaj minoritataj lingvoj oni antaŭvidas morton. Sed kiom bone ni entute konas la lingvajn minoritatojn kaj malgrandajn popolojn de Nordio? Ni konatiĝos kun la lingva situacio en Nordio, de la feroa ĝis la samea. (Austin)

Internacia komunikado

Internacia komunikado ne ĉiam senprobleme funkcias. Eĉ se oni samlingve komunikas kaj ĉio vorte direblas, kulturaj diferencoj inter parolantoj hungaraj, francaj kaj finnaj povas kaŭzi miskomprenojn. Komunikaj malfacilaĵoj kaŭzataj de kulturaj diferencoj estas prelego kun multaj ekzemploj kaj diskuto. (Berthelot)

Kial reguloj?

aus, bei, mit, nach, seit, von, zu + dativo, *en banan, bananen, bananer, bananerna* (fleksia klaso 3), "Mi neniam forgesas akuzativoN". Kial Esperanto entute havas regulojn? Kial lingvoj ĝenerale havas tiom da reguloj? Ĉu nur por turmenti nin? (Wennergren)

Esperanto kiel hejma lingvo

Malantaŭ la publika vizaĝo de Esperanto kiel "lingvo internacia" troviĝas la uzo de la lingvo en hejmoj kaj familioj. Verŝajne la plimulto de la Esperantaj frazoj ĉiutage elparolataj en la tuta mondo estas elparolataj ĝuste en hejmoj, sed la ordinara movadano apenaŭ konas la fenomenon. (Lindstedt)

Kiom viva estas Esperanto?

Sengrena, spica inĵo, venis fino al nia latino, melku vian cerbon, kartona pajaco, iru saluti la pionirojn, unu parolas pri motoro, la alia pri ŝoforo, umumita kiel porko...

La prelegantoj traktos diversajn uzokampojn de Esperanto, de trinkejaj konversacioj ĝis beletraj kunteksto, de repkantoj ĝis amorado kaj insultoj, kaj diversgradan evoluantecon de Esperanto en tiuj diversaj terenoj. (Ertl/Austin)

Kiaj estas esperantistoj?

Kia estas la esperanta parolkomunumo? Ĉu tipaj esperantistoj ekzistas? Oni traktas la temon el soci-psihologia vidpunkto. (Berthelot)

Arta programo

- ◆ Teatraĵo "Gastamo" de Spomenka Stimec (Variantoj)
- ◆ Beletraj prezentoj (Ertl)
- ◆ Koncertoj de Dolcxamar kaj Persone
- ◆ Dancovespero

Bonvenon al la Aŭtunaj Tagoj en Helsinko!

EKH, FEJO kaj EAF

Syospäivien järjestelyistä

Syospäivät pidetään kulttuurikeskus Caisassa, jossa pidettiin myös viime kesän KEF. Myös ruokailu tapahtuu Caisassa, Cafe Exoticissä. Ruokailupaketti sisältää perjantaina iltapalan, lauantaina lounaan, kahvin ja iltapalan ja sunnuntaina lounaan ja kahvin. Paketti maksaa 160 mk. Aterioita voi tilata myös erikseen, jolloin lounaat ja iltapalat maksavat 40 mk ja pullakahvit 15 mk.

Halukkaille varaamme hotellihuoneen joko Hotelli Antonista (Paasivuorenkatu 1, rajallinen määrä huoneita) tai Eurohostelista (Linnankatu 9). Hinnat: Anton 1-hh 340 mk/yö, 2-hh 440 mk/yö, 3-hh 540 mk/yö, sisältävät aamiaisen, Eurohostel 1-hh 190 mk, 2-hh 220 mk/yö, aamiainen 29 mk.

Hotellimaksut voi maksaa joko etukäteen tai vasta paikanpäällä suoraan hotelliin. Fejolaisten yhteismajoitus on ilmainen, mutta ota oma makuupussi mukaan.

Eŭropa jaro de lingvoj

ELFI informas

En la jarkunsido de ELFI en Hämeenlinna Carola Antskog estis elektita nova sekciestro (prezidanto). Erkki Kemppainen estas vicprezidanto, Sylvia Hämäläinen sekretario, Tapio Sormunen kasisto kaj Raita Pyhälä, Anna-Liisa Ali-Simola kaj Kaija Liimatainen estraranoj. Soili Salminen kaj Martti Pennanen estas revizoroj, vice Tuula Laatikainen kaj Reino Eriksson.

La membrokotizo estas 120 mk. Bonvolu pagi ĝis la 30.4.2001 al la konto 800015-129185.

Oulu

Oulun esperantoseura piti vuosikokouksensa 24.2.01. Puheenjohtajana jatkaa edelleen Erkki Röntynen. Muut hallituksen jäsenet ovat Allan Mehtonen, varapuheenjohtaja, Eila Martin, Stanislawa Mehtonen, Aira Röntynen ja Auli Vihermä. Varajäseniksi valittiin Juha-Mikko Ahonen ja Muhammed Bettahar.

Esperanto-Klubo de Helsinki

Jarkunvenaj novaĵoj

La jarkunveno de nia klubo okazis 6.2. En la oficejo kolektiĝis deko da membroj. La jarkunveno pritraktis la aferojn difinitajn en nia statuto. Estis aprobitaj la agadraporto kaj financa raporto de la pasinta jaro kaj malŝarĝo al la estraro. La kunveno elektis por la jaro 2001 la jenan estraron: Sakari Kauppinen, prezidanto; Patrik Austin, Anna-Liisa Heikkinen, Riitta Hämäläinen kaj Jukka Vaijärvi estraranoj kaj Ritva Sabelli kaj Eeva Vaijärvi vicestraranoj. Kiel revizoro estis elektita Raimo Tuisku kaj vice Heta Kesälä.

Posta estrarkunsido elektis Jukka Vaijärvi vicprezidanto, Ritva Sabelli sekretario kaj Eeva Vaijärvi kasisto de la klubo.

Printempa programo de EKH kaj FEJO

17.4

17.30 beletremula rondo en la oficejo (FEJO)

19.00 biero kaj babilo en Kellarikrouvi

24.4

18.00 Mondmuzika vespero en la oficejo

8.5

18.00 Vinvespero en la oficejo

11.5

Futbalmacxo Helsinko-Porvoo en Ravirata (FEJO)

15.5

17.30 Beletremula rondo en la oficejo (FEJO)

26.5

16.00 Printempa ekskurso al Käpylä

5.6

17.30 Beletremula rondo en la oficejo (FEJO)

9.6

Somera vespero en Kuusiluoto

Pliaj detaloj en www.esperanto.fi/helsinki.

Ŝamano-Pieĉjo kaj ŝamandrumo.

Someraj ŝamanoj en Kuusiluoto 9.6.

Unu el la frusomeraj aranĝoj de Esperanto-Klubo de Helsinki estas somera vespero en Kuusiluoto, sabate la 9an de junio. La saman aranĝon forte partoprenos ankaŭ FEJO. Eble reviviĝo de la tradicio pri Someraj Tagoj de FEJO?

Dum la aranĝo ni somerumos, saŭnumos, bivakumos, manĝos, konatiĝos kun la ekzota etoso de Kuusiluoto. Fejoanoj ankaŭ tranoktos tie, aŭ en tendoj aŭ en la domo.

La estrarano de EKH, Jukka Vaijärvi, estas Kuusiluoto-aktivulo.

Riitta: Rakontu al ni, Juĉjo, kio estas Kuusiluoto?

Jukka: Kuusiluoto estas insulo, kiu situas meze de la golfo Vanhankaupunginlahti en Helsinko. Tipaj por Kuusiluoto estas acerarbaroj, kiuj donas al ĝi iom fabelan aspekton kaj rokaj kampoj. Insule pasigas sian tempon la asocio



Esperanto-societo en Turku

Societa jarkunveno 4.2.2001

Jarkunveno: La laŭstatuta jarkunveno de la societo okazis la 4-an de februaro 2001 en Blua Salono de la Malnova Urbodomo. Ĉeestis nur 8 societanoj, verŝajne la malvarma vintra vetero forpelis homojn. Sed ankaŭ ĉifoje la societo regalis siajn membrojn per kafo aŭ teo kun bongustaĵoj pri kio zorgis Toini Oittinen kun helpo de aliaj.

En la societa estraro estis denove reelektitaj samaj personoj kiel jam dum multaj jaroj. Tiina Oittinen elektiĝis kiel prezidanto. Sen reelektito en la estraro daŭrigas Paula Harju, Varpu Karo kaj Anja Launiainen. Kiel estraranoj por la jaroj 2001-2002 estis reelektitaj Anna-Liisa Ali-Simola kaj Leena Tiusanen kaj kiel vicestrarano dum 2001 Veikko Tikkanen, kiu ankaŭ daŭrigas kiel kasisto kaj librotenisto. Do, mankas el la estraro unu ordinara membro kaj du vicmembroj. La estraro ricevis rajton kompletigi sin dum la jaro. – Dankon al niaj multjaraj estraranoj Ulla Salonen kaj Anna-Liisa Kylänpää.

La jarkunveno elektis denove Ilpo Forström kaj Leila Laineoja kiel revizorojn kaj Jorma Ahomäki kun Kerttu Kemppinen kiel vicrevizorojn.

Jubilea jaro – juhluvuosi

Esperanto-societo en Turku fariĝos 40-jara. Por memori la interesajn kaj okazplenajn pasintajn jarojn ni aranĝos festan posttagmezon la 14-an de oktobro 2001 je 14.00 en la Verda Salono de la Kultura Centro. Ĉiuj niaj geamikoj estas treege bonvenaj! Notu jam la daton! Unu vizitanto de longe for jam konfirmis sian partoprenon: s-ro Sylvan Zaft el Michigan, Usono vizitos en septembro-oktobro Finnlandon. Li estos gasto de nia estimata eksprezidanto Jorma Ahomäki kaj vizitos i.a. Tampereon, la AT en Helsinki kaj nian societanan feston. Li skribis i.a. jene en Vekilo (gazeteto de la jam 80-jara E-societo Antaŭen en Tampere): “Mi antaŭvidas kun plezuro mian viziton al Finnlando. Por mi Finnlando estas norda lando kiu estas tre riĉa je lagoj, arbaroj, klasika muziko, moderna teknologio, lando kie oni povas ĝui vivi kaj en naturo kaj en bonstata moderna socio, lando kie oni povas loĝi en moderna apartamento en pinarbaro.” Bonvenon Sylvan kaj ĉiuj aliaj!

Printempa ekskurso

La bela insulo Ruissalo, perlo de nia urbo atendos nin la 3-an de junio 2001. Ni vizitos la lokajn vidindaĵojn i.a. la botanikan ĝardenon per helpo de la urba aŭtobuso no 8. Niaj ĉiĉeronoj Leena kaj Tiina rakontos pri la historio, naturo kaj lokoj de la insulo. Kafopaŭzon ni havos en la fama Honkapirtti.

Vanhankaupungin Kulttuuri-Ekologinen Klubi, kiu okupiĝas pri lokaj kulturaj kaj ekologiaj aferoj. Insule situas duetaĝa vilao, konstruita en 30-aj jaroj, saŭno, ilarejo, necesejo kaj arbardometo. La insulo atingeblas per traba pado ekde Pornaistenniemi kaj Lamassaari aŭ boate, vintr eblas ankaŭ promeni, skii, glitkuri aŭ bicikli sur glacio.

Dum la aranĝo ni spertos ankaŭ eksterordinaran muzikon: Ŝamandrumojn.

Riitta: Hippo, granda ŝamano de Pukkila, ra-

kontu al ni, kio estas ŝamandrumo aŭ ŝamandruma muziko?

Hippo: Ŝamandrumo estas instrumento, per kiu oni kontaktis/-as alian mondon, la spiritan mondon. En prakulturo la drumisto ne estis muzikisto, sed ceremoniestro, ŝamano, kiu ”vojaĝis” al alia mondo. Nia rilato al la drumo estas pli muzikista. Ni celas per drummuziko oferti al nuntempuloj senton pri unuiĝo kun la ĉirkaŭanta mondo kaj naturo.

Pliaj informoj en www.esperanto.fi/helsinki



OSA 1

Raportti Esperantolehdele

Kohde:

Pipsa Ahonen, 20 vuotta, Helsinki. Opiskelee kemiaa Helsingin yliopistossa.

Status:

Valittu FEJO:n hallituksen varapuheenjohtajaksi 13.1.2001.

Ulkonäkö:

Muuntautumisen mestari. Vaihtanut hiustensa väriä neljä kertaa viimeisen vuoden aikana: sinivihreä, punainen, kirkkaan pinkki, nyt hillitty brunette.

Mielentila:

Aamuisin sekava. On mm. juossut bussiin ja näyttänyt kuskille matkalipun sijasta terveyssidettä. Kärsinyt äskettäin kahdenkymppin kriisistä.

Kansainväliset suhteet:

Ystäviä korkeilla paikoilla: asunut noin viisi vuotta kahden ja puolen kilometrin korkeudessa Etiopiassa, Addis Abebassa. Asunut myös Keniassa sisäoppilaitoksessa.

Kontaktit:

Liikkuu epäilyttävissä piireissä: harrastaa tähtitiedettä ja käyrätorven soittoa. Liftaa Helsingin yössä pelottomasti. Liftausseurana nähty mm. maksullinen nainen. Matkustanut myös vankikarkurin kyydissä. Viihtyy baareissa ja tanssilattialla, pitää värikkäistä drinkeistä.

Suhde esperantoon:

Aloittanut kielen opiskelun puolitoista vuotta sitten. Vaikuttanut Variantoj-teatteriryhmässä.

Kertonut pitävänsä onomatopoeettisdeskriptiivisistä (!) sanoista, kuten shushi. Edustaa FEJO:a Italian IJF:ssä huhtikuussa.

Arvio:

Mainio tapaus, nainen paikallaan.

Helsingissä 14.3.2001

Katja Lampinen

Raportti Esperantolehdele

Kohde:

Katja Lampinen, 23 vuotta, Helsinki. Opiskelee Radio- ja TV-ilmaisun linjalla Helsingin ammattikorkeakoulussa.

Status:

Valittu FEJO:n hallituksen sihteeriksi 13.1.2001.

Ulkonäkö:

Havaintoja laidasta laitaan, esim. ihonmyötäisessä nahka-asussa sekä lukuisia yrityksiä pukeutua mieheksi, mm. Tommi Läntiseksi ja itäeurooppalaiseksi esperantistiksi.

Mielentila:

Kyseenalainen. Pystyy nukahtamaan moottoripyörän kyydissä. Jos saisi olla päivän näkymätön, menisi seuraamaan USA:n ja Venäjän johtohahmoja ja todistamaan oikeaksi teoriansa siitä, että tätä maailmaa hallitsee lopulta pienen sisäpiirin salaliitto. Levittänyt päähänpintymäänsä elämän onnellisuuden tavoittelusta myös FEJO:n piirissä. Tämän ideologian mukaan maailman onnellisimmat ihmiset asuvat vihreissä puutaloissa.

Kansainväliset suhteet:

Havaintoja mitä erilaisimmista paikoista, esim. moottoripyörän selässä Norjan Lofoteilla ja mikrofoni kädessä Kansallisoopperan päälavan alla.

Kontaktit:

Journalistiksi opiskelun myötä omaa suuren määrän hyödyllisiä kontakteja. Haastatellut mm. oopperan kuiskaajaa (joka ei suinkaan kuiskaa, vaan huutaa). Haluaisi haastatella Tarja Halosta.

Suhde esperantoon:

Aloittanut kielen opiskelun puolitoista vuotta sitten. Imaistuu mukaan toimintaan Variantoj-teatteriryhmän myötä. Nykyään FEJO:n hallituksen sihteeri.

Arvio:

Viiden vihreän tähden arvoinen paketti.

Helsingissä 14.3.2001

Pipsa Ahonen

Sananjohtoleikki

Otetaan jokin ”juuri” eli merkityksen ydinosa, ”vartalo”, vaikkapa SKRIB. Lisätään siihen päätteitä ja /tai etuliitteitä ja katsotaan, mitä tulee. Liitelistan voi ottaa sanakirjansa takaa, tai sitten sovitaan, että käytetään vain muistia. Kuka saa eniten järkeviä sanoja kokoon määrääjassa? Sanat on osattava selittää, ja niitä on voitava käyttää lauseissa. Voidaan myös sopia, että saa tehdä yhdyssanoja, kuten alla on tehty.

skrib i	kirjoittaa
skrib e	kirjallisesti
skrib ad i	kirjoitella tämän tästä
ek skribi	ryhtyä kirjoittamaan
re skribi	kirjoittaa uudestaan
mis skribi	kirjoittaa väärin
sub skribi	allekirjoittaa
super skribi	kirjoittaa päälle, korjata pyyhkimättä
kaš skribi	kirjoittaa salaa
mašin skribi	kirjoittaa koneella (tajpi)
fi skribi	kirjoittaa rumia
fuš skribi	pilata kirjoitus jos sitä tehdessään
skrib o	kirjoitus, kynän jälki paperilla
Brajla skribo	pistekirjoitus, sokeiden kirjoitus
manskribo	käsiala
subskribo	allekirjoitus
la Sanktaj Skriboj	uusi ja vanha testamentti
skrib aĉ o	töherrys, harakanvarpaat

skrib ilo	kynä
skrib il aro	kirjoitusvälineet
skrib isto	kirjoittaja, kirjuri, kirjailija (verkisto)
skrib anto	kynänkäyttäjä joka ei työkseen kirjoita
skrib ema	kirjoitushaluinen, kova kirjoittamaan paljon kirjoittava ihminen
skribem ulo	kirjoittaminen – teko ja tapahtuma
skrib ado	kirjoitus, juttu, artikkeli nimikirjoitus (autografo)
skrib aĵo	kirjoituttaa toisilla kuvailla
mem skribaĵo	sanoinkuvaamaton kirjoittamaton
skrib iĝi	kirjoitusala
pri skribi	kaunokirjoitus (kaligrafio)
ne pri skrib ebla	hautakirjoitus
ne skrib ita	
skrib subaĵo	
bel skribado	
tombo skribo	

Jos osaa johtaa sanoja, niin sanavarasto moninkertaistuu jokaisesta opitusta juuresta. On vain muistettava, että kaikille johdetuille sanoille ei löydä suomennosta ja että pelkkä tekninen yhdistely voi antaa tulokseksi sanoja, joita ei tarvita. Vai mitä sanotte tästä luomuksestani ”skrib|ej|estr|o”, kirjoittamon johtaja? Tai sanasta ”eks|skrib|em|ul|in|o”, entinen himokirjoittajatar? (HUOM! Hän himoitsi vain kirjoittamista.) Sanoista on syytä kiistellä. Aloittakaa vaikka manĝjuuresta!

Amuzema Saliko Ridetanta

Fotado, kajakado kaj Eeva

Dum miaj lernejoj jaroj fotado estis tre populara hobbio inter miaj samklasanoj. Kelkaj knaboj povis pasigi horojn parolante pri la ecoj de la plej novaj fotiloj, kun amaso da objektivoj, motorigitaj filmmoviloj kaj tiaĵoj. Eble kelkaj trovis tempon eĉ foti. Iel tiu fervoro tamen ne kaptis min. Dum multaj jaroj mi tute ne interesiĝis pri fotado. Ŝajnis al mi ke por iĝi sukcesa fotulo, oni devus elspezi multon da mono por havi sufiĉe bonan fotilaron kaj la fotado mem estis iaspeca sekreta scienco – oni devas scii multegon da aferoj kiel lumigi fototaĵon, kian filmon uzi ktp. Eble kelkaj seniluziigoj de fotado kun poŝfotileto kontribuis al mia pesimismo. Ofte mi ekzemple forgesis demeti fingron de antaŭ la lenso, do ĝi aperis bilde kiel nigra nebulo. Kaj kutime ĉiuj per fulmolumilo fotitaj homoj havis ruĝajn okulojn kvazaŭ alkoholistoj. Poste mi lernis ke tiu fenomeno

estas tre kutima, ĝi okazas kiam la okulaj retmembranoj de la fotatulo reflektas la lumon reen al la lenso. Homa retmembrano brilas ruĝe sed tiuj de bestoj havas alian koloron, ekzemple kata retmembrano reflektas verdan lumon. Vere interesajn aferojn oni lernas per aĉa fotado.

Pasis jaroj kaj mi interesiĝis pri aliaj aferoj, trovis novan hobion kaj komencis pagaji per kajakado. Mia scivolemo kondukis min al multaj interesaj insuloj kaj marbordaj lokoj en proksimeco de Helsinko kaj tiam mi reinteresiĝis pri fotado, ĉar estis agrable havi iun memoron pri la faritaj ekskursoj. Mi tamen ne trovis la marvojon al Nepalo sed mia unua sola padelado al Porvoo estis por mi preskaŭ same granda atingo kaj donis agrablan senton de sukceso. La komenco de la naŭdekaj jaroj estis ekonomie malfacila por mi kaj finnoj generale. Kiel senlaborulo



Eeva padelas antaŭ la lumturo de Bengtskär.



*Jukka kaj
Eeva Vai-
järvi.*

mi havis multon da tempo kaj povis facile padeli pli ol mil kilometroj en jaro. Eble tiu marumado helpis min resti sana kaj maldep-
rimita. Feliĉe la jarkotizo de nia padelasocio
ne altis kaj mi trovis tie multajn novajn ge-
amikojn, inter ili Eeva, mia edzino. Ni ren-
kontis dum baza padelkurso kiun nia asocio
donis al grupoj de padelontoj kaj ni ambaŭ
helpis kun instruado de tiuj novuloj. Eeva
miksitis min al kursano kaj observante miajn
manovrojn diris "He, ne apogu al via seĝo
kiam vi pagajas!" Mi respondis "Ba, ĉesu,
mi estas vickursgvidanto kaj scias kion
fari." Tiam Eeva ne sciis ke ŝi parolis al ŝia
venonta edzo. Poste ni ofte ridis al tiu nia
amuza unua renkonto. Tiutempe mi iom
ĉagreniĝis pro ŝia kritiko, kvankam ĝuste
bazita.

Eeva aĉetis novan fotilon por niaj padel-
ekskursoj kaj mi ankaŭ enamiĝis al ĝi. Ĝi
estas sufiĉe simpla por uzi, oni nur devas
teni ĝin stabila dum kelkaj sekundoj kaj

premi la ŝaltbutonon. La fotilo scipovas
aŭtomate adjustiĝi al la distanco de la foto-
aĵo kaj per ĝi eblas foti eĉ subakve. La unu-
nura eco en ĝi, kion mi ne ŝatas estas la mal-
granda baterio, kiun oni devas fojfoje ŝanĝi
kaj kiu ege kostas en fotilvendejo. Strange
ke oni ne povas uzi iun standarde grandan
normalan baterion kiu kostus nur kelkajn
markojn anstataŭ tiu speciala tridekmarka.
La leĝoj de merkatekonomio ofte laboras
strange, nekompreneble al simpla fotulo.
Tamen ni fotis multajn sukcesajn fotojn dum
niaj vojaĝoj kaj ekskursoj, mi konsideras ke
la plej bonaj estis bildoj de lumturo de
Bengtskär kaj la fajrkolora, preskaŭ tropika
sunsunbiro de Jurmo. Eble nia plej ŝatata
insulo proksime al Helsinko estas Itä-Tont-
tu, eta senarba roka insuleto, sur kiu kreskas
arbustoj kaj multaj belaj floroj. La mesaĝoj
de rokoj interesas. Ili rakontas pri magmo
kiu fluis ĉi-loke antaŭ jarmiljardoj kaj la
glaciaĝoj desegnis ankaŭ siajn ŝpurojn al tiuj ▷

Arbaro de Zamenhofin synty

Lapsena leikin usein tässä metsässä sisarieni ja serkkujeni kanssa, elimme siellä omaa satuamme. Vuosien varrella palasin tuohon lapsuuden taikametsään silloin tällöin kokemaan sitä taianomaista, utuista, pehmeää tunnelmaa, jota me lapset siellä koimme vanhojen puiden ja isojen kivien katveessa. Kun sain omia lapsia, vein heidät tuohon metsään, ja vanhin lapsistani, Henri, risti metsän Satumetsäksi. Julistettuamme esperantonkielisen satukilpailun aloin miettiä, miten Satumetsään saataisiin satukilpailuun liittyvää toimintaa. Halusin metsälle esperantonkielisen nimen ja mielestäni metsä oli tarpeeksi arvokas kantaakseen Zamenhofin nimeä – niin ristin sen Arbaro de Zamenhofiksi.

Merkitsin aluksi metsän kolme puuta kyltein: Ihmisoikeuksien Puu, Rauhan Puu ja Tasa-arvon Puu. Heinäkuussa 2000 kyläsämme pidetyn Esperanto-päivän aikana eräs Suomen merkittävistä esperantisteista, Allan Mehtonen, valitsi Suomen Puun. Muutamia päiviä myöhemmin luokseni saapui Pasporta Servon kautta puolalainen Pjotr Stankowski, joka valitsi metsän ensimmäisen kansainvälisen puun. Olen erityisen mielissäni siitä, että se on Puolan Puu, Arbo

de Pollando. Puola on minulle läheinen maa muutenkin kuin Zamenhofin kotimaana. Kävin Puolassa kymmeniä kertoja työskennellessäni laivoissa, ja rakastuin tuohon maahan.

Perustin Arbaro de Zamenhofin kesäkuun 2000 lopulla, ja nyt siellä ovat Suomen ja Puolan puiden lisäksi Rafael Blancon ja Xabier Rico Iturriotzin valitsema Espanjan Puu, Floreal Martorellin perheineen valitsema Ranskan Puu, Amanda Higleyn valitsema USA:n Puu ja Stefani Strunjakin ja Judita Rey-Hudecekin valitsema Kroatian Puu, sekä Osmo Bullerin valitsema UEA:n Puu. Myös lokakuisen satuviikon aikana Stefani Strunjakin sadusta paikalle saapunut Joulupukki valitsi oman puunsa. Samassa tilaisuudessa paikalla olleet lapset Stefani Strunjak, sisarukset Elina, Kirsi, Niina, Ismo, Anna ja Juho Tauriainen sekä sisarukset Henri, Sauli ja Pauliina Vääräniemi valitsivat yhdessä Ystävyyden Puun, Arbo de Amikecon. Ajatukseni on ollut, että maailman esperantistit kohtaisivat Arbaro de Zamenhofissa ja voisivat nauttia siellä luonnonrauhasta, toisistaan ja esperantosta.

Aini Vääräniemi

▷ varmaj glataj rokoj, agrablaj promeni sen-
 ŝue. Oni trovas tie duone subakvan ŝton-
 truon, boritan de fluinta akvo kaj ŝtono en-
 true. Mi ofte staris en tiu truo, la akvo atin-
 gas mian umbilikon en ĝi. Vere fotinda
 loko! Mi esperas ke evoluo ne detruas tiun
 ĉarman insuleton. Ĝis la sepdekaj jaroj en

Itä-Tonttu vivis iu fiŝkaptisto, kies domo ne
 plu ekzistas. Bruligita de preterpaŝintaj van-
 daloj nuntempe restas nur la betona fun-
 damento. Kelkajn metrojn de ĝi estas ebena
 herbaĵo se oni ŝatas pasigi la nokton tie
 tendumante.

Jukka Vaijärvi

Suomen esperantoliiton jäsenjärjestöt

Muutokset ja lisäykset osoitteistoon Ilkka Santtilalle, Tollinpolku 1 B 21, 00410 Helsinki, s-posti ilkka.santtila@esperanto.fi mieluummin kirjallisena.

Suomen Esperantoliiton paikallisyhdistykset toimivat:

- ♦ Helsingissä: Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ Sakari Kauppinen, sakari@skau.pp.fi
- ♦ Iisalmessa: Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi
- ♦ Jyväskylässä: Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä, (Terttu Tyynelä) PL 136, 40101 Jyväskylä
- ♦ Lahdessa: Lahden Esperantokerho / Esperantoklubo de Lahti, (Martti Pennanen) Kalliomaankatu 10, 15150 Lahti. ☎ martti.pennanen@pp.phnet.fi
- ♦ Mikkelissä: Mikkelin Esperantokerho / Esperantoklubo de Mikkelä, (Elli Husso) Porrassalmenkatu 27 B 51, 50100 Mikkelä.
- ♦ Oulussa: Oulun Esperantoseura / Esperantosocieto de Oulu, (Allan Mehtonen) Valtatie 6-8 B 15, 90500 Oulu
- ♦ Salossa: Salon Esperantokerho / Esperantoklubo de Salo (Matti Wallius) Eräpolku 1, 25130 Muurla ☎ matti.wallius@pp.inet.fi
- ♦ Tampereella: Esperantoseura Antaüen ry. / Esperantosocieto Antaüen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere. (Rainer Arvola, Käräjätörmä 2 E 32, 33310 Tampere, ☎ andromeda@koti.tpo.fi)
- ♦ Turussa: Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku, (Tiina Oittinen) Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ tiina.oittinen@pp.inet.fi
- ♦ Lappeenrannassa esperanton harrastajilla ei ole järjestöä, vaan "esperantoryhmä", jolle voi lähettää postia osoitteeseen (Irja Miettinen) Esperantogrupo de Lappeenranta, Yrjönkatu 6-8 A 1, 53600 Lappeenranta.

Lisäksi Suomen Esperantoliittoon kuuluu

- ♦ Suomen opettajain esperantoliitto, Jykyrintie 3, 69440 Lestijärvi. ☎ raitapy@jymy.kase.fi ☎ (06) 8637 351 Tilinro: 800015-129185
- ♦ Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ fejo@esperanto.fi
- ♦ Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☎ Ritva.Sabelli@sfs.fi ☎ (09) 660 651

Useiden paikkakuntien puhelinluettelosta hakusanan "Esperanto" kohdalta löytyy paikallisten harrastajien puhelinnumeroita.

ESPERANTOLEHTI

ilmestyy vuonna **2001**
aperas dum la jaro

Nro	Red.grupo komencas	Limdato	Aperas
3	1.5	15.5	1.6
4	1.7	15.7	1.8
5	1.9	15.9	1.10
6	1.11	15.11	1.12

Avustajien toivotaan noudattavan edellä esitettyjä aikoja. La redakcio esperas, ke helpantoj atentu la datojn supre.

Ilmoitushinnat

Ulkopuoliset mainostajat:	Jäsenet:
1/1 sivu 600 mk	1/1 sivu 300 mk
½ sivua 400 mk	½ sivua 200 mk
1/4 sivua 250 mk	1/4 sivua 125 mk

Palautusosoite: Esperantoliitto
Siltasaarencatu 15 C 65, 00530 Helsinki

Nova agado de FEJO: literatura rondo

Ĉi-printempe komenciĝas nova agado de FEJO: ni hejme legos kelkajn novelojn kaj poste kolektiĝos por pridiskuti ilin. La ideo pri la literatura rondo naskiĝis en mia kapo kiam mi legis la novaĵojn de FEJO en la plej nova Esperantolehti. Tie konstatis Riitta ke Porvoo ĉi-momente estas la plej esperantojunulara urbo en Finnlando, la kialo por tio estante interalie la loka junulara esperanta studrondo de kvar personoj.

Nu, la plej esperantojunulara centro de Finnlando ja estas Helsinko. Sed iun esperantan studrondon ni (ankoraŭ) ne havis en mia kara hejmurbo. Kial ne? Pensuminte tion mi konkludis ke ne estis io taŭga kialo kaj plupensumis kian studrondon oni povus ekhavi. Ĉar mi mem havas 20-jaran sperton pri literaturo kaj ĉar ĝi ĉiam estis mia plej ŝatata formo de kulturo, mi decidis ke literatura rondo ĝi estu.

Kiam mi demandis ĉu iuj aliaj helsinkaj fejoanoj interesus pri ĉi-tipa agado, la ideo tuj vekis ĝojigan reeĥon. Mi proponis ke ni prefere legu novelojn ĉar mi bone memoris mian konatiĝon kun finna literaturo en Esperanto: daŭris plurajn monatojn legi Sep fratoj UK-somere 1995. La sperto estis sendube bona, sed studrondo ja dev-

us kolektiĝi pli ofte ol trifoje jare. Riitta afable eltrovis kelkajn novelojn kiujn ŝi estimis taŭgajn, kaj ni interkonsentis pri la legotaj noveloj (kaj unu komikso) kaj la datoj de kolektiĝo por ĉi-pritempo (sube).

Por la aktivaj KEF-partoprenantoj kaj aranĝantoj ĉiuj kvin aŭtoroj verŝajne jam estas plimalpli konataj. Mi tamen opinias ke la literatura rondo kolektiĝos por ke ni kaj lernu la lingvon kaj ekkonu pli da esperanta literaturo – kaj se ne por io alia, almenaŭ por amuziĝo. Kore bonvenaj estas ĉiuj fejoanoj kaj aliaj kiuj interesiĝas pri (esperanta) literaturo. La tekstojn oni povas peti de Riitta <riitta@arctinar.com>.

Kolektiĝoj je la 17.30 en la oficejo en Siltasaarencatu printempe 2001:

27.3. Spomenka Stimec: Do... gratulon!

17.4. Liven Dek: Marta kaj Maria & Gonçalo Neves: Kokro kokerikas jam.

15.5. Arnau Torras: D-ro Senesperanto serĉas la bonan etoson.

5.6. Jorge Camacho: Mensogo de l'okuloj, mensogo de l'oreloj.

Hanna Helén

Seuraava numero ♦ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy kesäkuun alussa. Jutut 15.5.2001 mennessä Aimo Rantaselle. Venonta numero aperos en la komenco de junio. Artikoloj ĝis 15.5.2001 al Aimo Rantanen. Osoite/adreso: PL 2, FIN-40801 Vaajakoski, puh/tel. (014) 261 438, s-posti/rete: <esperantolehti@esperanto.fi>.